

JUBILEO DE ĈELJABINSKA E-KLUBO

La 10-an de decembro ĉeljabinskaj esperantistoj kunvenis por festi la 35-jariĝon de sia E-klubo. Nin jam tradicie gastigis en sia hejmo la E-familio de nia veterano Viktoro Laptev, kiu estas unu el la kunfondintoj de la klubo. Krom 7 ĉeljabinskanoj la festadon partoprenis ankaŭ la gastoj – geedzoj Vŝivcev el Miass, ambaŭ eksmembroj de ĈEK.



La postmilita historio de Esperanto en Ĉeljabinsk komenciĝis en 1957, kiam post la moskva Festivalo de junularo kaj studentoj B.F.Sokolov, nia nun jam forpasinta veterano, esperantisto de 1925, komencis gvidi kurson kaj fondis E-rondeton en Agrikultura instituto. Sed kiel klubo ĉeljabinskaj esperantistoj identiĝas sin ekde majo 1970, kiam ili organizis Renkontiĝon de Esperantistoj de Volgio kaj Uralo – REVU-2. Nun nia iam forta klubo ne estas aktiva, kvankam konsistas nur el spertaj esperantistoj, kies E-staĝo estas de 20 ĝis 46 jaroj, sed la “maljunuloj” jam iom post iom komencis revigliĝi, kaj ni esperas je apero de nova, juna generacio kaj renaskiĝo de ĈEK.

Ĉe la festa tablo la klubaj veteranoj Viktor Laptev kaj Vjaĉeslav Rojdestvenskij rakontis pri historio de la klubo, estis diskutita la nuna kluba aktivado. Ĉiuj nostalgie rememoris belajn momentojn el nia iam tre vigla kaj gaja E-vivo kaj ĝuis la varman amikan etoson, kiu ĉiam regas en la klubo. Kaj kiel kutime sonis niaj “oraj kantoj”.

La festado de la jubileo evidentiĝis tiom agrabla, ke ni decidis sekvatage daŭrigi ĝin jam en Miass, kien veturis la familioj Terentjev kaj Vŝivcev. Entute tie kunvenis 11 personoj, inter kiuj estis eĉ tri eksprezidantoj de ĈEK – Aleksandr Knjazev, Aleksej Fomin kaj Timofej



Všivcev. Ankaŭ la plejmulto de la ceteraj kunfestantoj iam estis ĉeljabinskanoj kaj devenis el nia klubo – do tio estis nia komuna jubileo. Ni spektis videofilmojn pri la lasta REK-EoLA kaj pri la somera interkluba renkontiĝo enarbara. Aleksej Fomin gitarludis, kaj ĉiuj plezure kantis kun li. La festado daŭris ĝis malfrua vespero. Ni estas dankaj al la mastroj pro tiom varma akcepto.

Sed mi suspektas, ke ankaŭ tiu renkontiĝo ankoraŭ ne estis fino de la festado... Ja sekvadimanĉe mi kun la edzo laŭ la multjara tradicio partoprenis en Zamenhof-tago en Jekaterinburg, kie loĝas ankoraŭ unu eksprezidanto de Ĉeljabinska E-klubo – nia amiko Viktoro Kudrjavcev.

Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk)

ZAMENHOF-TAGO EN JEKATERINBURG

La 18-an de decembro esperantistoj de Jekaterinburg okazigis en la urba Domo de Paco kaj Amikeco Zamenhof-tagon. Por realigi interesan kaj varian programon kunvenis 22 partoprenintoj. Al la aranĝo venis kaj aktive partoprenis gastoj el na-



jbaraj urboj – Galina kaj Nikolaj Terentjev el Ĉeljabinsk kaj Larisa Kuzjmenko el Niĵnij Tagil.

Antaŭ la komenco de oficiala programo ĉiuj ĉeestantoj povis konatiĝi kun ekspozicio de E-libroj, eldonitaj en Rusio en

2005, kaj E-revuoj el diversaj landoj.

Kvankam Zamenhof-tago estas komuna jarfina Esperanto-evento kun jam tradicia programo, tamen ĉiu jaro havas siajn specifaĵojn. Ĉi-foje la programo komenciĝis per la prelego “Zamenhof-tago”, verkita de K.Kalocsay, kiun voĉlegis nova aktiva esperantisto Aleksandr Osincev. La plej juna jekaterinburga esperantistino, la 6-jara Margarita Rešetnikova, ravis ĉiujn ĉeestantojn, parkere prezentinte serion da proverboj el Zamenhofa “Proverbaro”.

Agrabla parto de ĉi-jara programo estis konatiĝo kun komencantoj, ĵus finintaj la elementan kurson de Esperanto ĉe la Pedagogia Universitato. Okazis solena enmanigo de atestoj al ili, post kio la novuloj prezentis kelkajn koncertajn programerojn. Tatjana Kulakova informis la partoprenintojn pri freŝaj E-novaĵoj kaj gvidis kvizon pri historio de Esperanto. Dum la tuta aranĝo seriozaj programeroj alternis kun la distraĵoj. Dividitaj je du teamoj, ĉiuj aktivis en amuzaj konkursoj kaj gajaj ludoj.

La lasta parto de la aranĝo estis bankedo, kie ĉiuj povis en agrabla etoso babili,

ŝerci, kune kanti, trinki teon kun dolĉaĵoj. Dum la bankedo la gastoj el Ĉeljabinsk, Galina kaj Nikolaj Terentjev rakontis pri la 35-jara jubileo de Ĉeljabinska Esperanto-klubo, kiun ili festis antaŭ kelkaj tagoj. En Jekateriburg ankaŭ loĝas kelkaj eksaj ĉeljabinskaj klubanoj, tial la kompanio rememoris kune la pasigitan iamon, ĉiuj tostis per ĉampano okaze de la jubileo.



La kelkhora agrabla komunikado finiĝis per tradicia komuna kantado.

Raja kaj Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg)

ZAMENHOF-TAGO EN TIĤVIN

La 15-an de decembro 26 anoj de Esperanto-klubo kunvenis en la Tiĥvina Kulturpalaco por festi Zamenhof-tagon. Vigla kaj interesa programo daŭris ĉirkaŭ kvar horojn. Enestis:

- gratulparolo de la kluba prezidanto;
- trinkkantoj kaj tostado kun konvenaj trinkaĵoj;
- libroprezentado;
- tradicia spektakleto de la komencintoj;
- gajaj konkursoj, inkluzive kvizon pri Esperanto;
- kantoj.



Fotojn pri la festo oni povas vidi en la kluba retpaĝo <<http://www.tiek.narod.ru/>>. La klubanoj dankas aron da aliurbaj E-societoj, kiuj rete, telefone kaj somose sendis gratulojn por la festo.

Viktoro Kandalinskij, la prezidanto de Tiĥvina Esperanto-klubo

ZAMENHOF-FESTO EN VOLGOGRAD

Volgogradaj e-istoj festis la Zamenhof-feston en la Kulturdomo nome de Gagarin en la norda urboparto. Partoprenis en ĝi reprezentantoj de du el tri E-grupoj en la urbo: tuturba junulara “Venko” kaj EK “Esperanto” el la suda urboparto (ĉi-lasta cetere eĉ pli juna laŭkonsiste, ĉar plej multaj ĝiaj membroj estas lernejanoj). La festo konsistis el konkursoj, iom da kantoj kaj teumado en la paŭzoj. Aldona informo: en Volgograd nun okazas du E-kursoj – en Krasnoarmejskij distrikto (suda urboparto), kiun gvidas por lernejanoj Tatjana Vtorova, kaj en la urba infanajunulara biblioteko (centra urboparto), kiun gvidas Aleksej Kaŝirin kaj Inna Kotljarova.

(esperanto-rus-informoj)

ZAMENHOF-FESTO EN JALTA

Nekutime pasis ĉi-jare la Zamenhofa festo en la E-interklubo “Tero”. Dum du horoj la programon filmis jalta televido, kies ĵurnalistino estas nia klubanino Jelena Ilnickaja. Tial la programo pasis tute en la rusa, krom la kantoj de Pavel Moĵajev. Por festi la datrevenon kolektiĝis 22 klubanoj. Pavel Moĵajev kurte rakontis pri Zamenhof kaj Esperanto, Jefim Zajdman informis pri la plej interesaj E-libroj, aperintaj ĉi-jare, pri la kluba laboro kaj planoj por la nova jaro. Siajn impresojn pri partopreno en internaciaj E-aranĝoj rakontis ankaŭ Irina Gerasimova kaj Sergej Rodin. Dum la kunveno ni montris perkomputile peceton de la demonstra programeto de la Internacia Televido, speciale sendita al ni ĉi-cele. La filmita materialo estos uzita por televida elsendo pri nia interklubo. Krome la kantadon de Pavel ni uzos por filmo pri Jalta kaj nia klubo, kiun la televida teamo estos faranta por ni popece dum la monato. Ni preparas ĝin por la Internacia Televido. Post foriro de la filmisto komenciĝis la gaja ĉetabla festado. En la planoj de la klubo: partopreni grupe Boatadon en Litovio fine de majo kaj la Internacian Junularan Semajnon en Hungario meze de aŭgusto.

Jefim Zajdman (Ukrainio)

ZAMENHOF-FESTO EN ODESO

La naskiĝtagon de L.Zamenhof esperantistoj de Odesa urba Esperanto-klubo “Blanka akacio” festis dum kelkaj tagoj.

En Studenta Domo de Odesa Nacia Politeknika Universitato okazis solena kunveno, dediĉita al la kreinto de Esperanto. La kunvenon partoprenis membroj de la filio de E-klubo “Blanka akacio”, kiun gvidas docento Tamara Popova. Ŝi rakontis pri la vivo kaj literatura heredo de Ludoviko Zamenhof. Studentoj de la Universitato Marija Skurtul kaj Miĥail Dimitrijeviĉ prezentis al la ĉeestantoj grandan dumetran standon, kiu enhavas sufiĉe ampleksan informon pri la lingvo E-to kaj la vivo de L.Zamenhof. Pri tutmonda E-movado rakontas multaj artikoloj, fotoj, poemoj, markoj, kovertoj, adresoj por dezirantoj korespondi kun alilandaj esperantistoj.

Esperantistoj de la klubo partoprenis komunan kunvenon de Odesa urba handikapula societo, dediĉitan al la 15-jariĝo de Unuiĝo de handikapulaj organizaĵoj en Ukrainio, kies membro estas esperantistino Ludmila Orajevskaja. Dum la kunveno prezidanto de la societo N.Komarov enmanigis al L.Orajevskaja diplomon pri ŝia

aktiva laboro en la societo. Li diris, ke enmanigo de la diplomo dum Zamenhof-tagoj estas agrabla kaŭzo por almenaŭ kurte rakonti pri Esperanto. Kaj li substre-kis, ke L.Orajevskaja tradukas el kaj al E-to sciencajn artikolojn, partoprenas kaj venkas en literaturaj E-konkursoj.

Tradicie okazis ĉiujara festado de la naskiĝtago de L.Zamenhof en la urba Es-peranto-klubo “Blanka akacio”. Semjon Vajnblat rakontis pri la vivo de la kreinto de Esperanto. Ĉiuj periodoj de lia agado estis ilustritaj per fotoj el la albumo de Henk Thien “La vivo de d-ro L.L.Zamenhof en bildoj”. Multajn fotojn el tiu al-bumo oni povas rigardi en la retejo <[www. Esperantouniverse.com](http://www.Esperantouniverse.com)>.

Okazis ankaŭ literatura vespero dediĉita al la verkado de L.Zamenhof, kiun lerte gvidis T.Popova. M.Dmitrijev, kiu kolektas verkojn de D-ro Esperanto, em-faze tralegis ok poemojn de la Majstro. L.Orajevskaja kaj S.Vajnblat tralegis versa-ĵon de L.Zamenhof “Ho, mia kor’”, kiun ili tradukis al la rusa lingvo.

En kadroj de Zamenhof-tagoj ankaŭ okazis gratulado de “blankakacianoj” okaze de la tradicia kluba festo de esperantistoj, kiuj naskiĝis vintre. Ili ricevis bonajn donacojn – Esperantajn librojn. Dum la gaja ĉetabla festado estis plenumitaj multaj E-kantoj.

Semjon Vajnblat (Odeso)

RENKONTIĜO EN PLJOS

Dum 3 tagoj (de la 6-a ĝis la 9-a de januaro) en Pljos sukcese pasis PljosIMEA-6. La tradicia renkontiĝo por esperantistoj ekhavis novan formon – vintra semi-nario pri sana vivmaniero. Ĝin partoprenis 36 personoj el kelkaj regionoj de Rusio (plejparte el Ivanovo, Moskvo kaj N.Novgorod). Ĉefajn programerojn – semi-narion pri Taja masaĝo gvidis Marija Tulajeva (Ivanovo) kaj kurson pri jogo (Ĥaŭa kaj porpara) gvidis Larisa Moskvina (Ivanovo). Marija Ĵukolina (Ivanovo) kaj Irina Gonĉarova (Odincovo) gvidis E-kursetojn respektive por novuloj kaj pro-gresantoj. Oni okazigis ankaŭ psikologian trejnadon kaj masaĝkursojn. La parto-prenintoj gustumis teojn dum diverspecaj teumadoj: mate-teojn kaj ĉinajn teojn. Neforgeseblaj estis promenadoj tra la vintra pitoreska urbo Pljos! Ĉe la adreso <<http://guarant.rusma.ru/pljos>> eblas vidi la fotojn pri la renkontiĝo.

Pavel Volkov (Ivanovo)

Judo iris al koncerto en Varsovio (antaŭ la dua mondmilito) kaj sidiĝis apud gojo. Unue aperis kantisto, kiu belege prezentis operajn ariojn kaj ricevis mul-tajn aplaŭdojn. Tiam flustris fiere la judo al sia najbaro: “Li estas unu el ni!” Poste okazis mirinda prezento de violonisto. Ankaŭ li ricevis multege da aplaŭ-doĵ. Diris tiam la judo al la gojo kun ĝojo: “Ankaŭ li estas unu el ni”. Sekvis fascina kantistino, kiu sukcesis vibrigi la korojn de la spektantoj. Tiam reagis la ĝojplena judo: “Jen denove juda!” Finfine la pola najbaro perdis sian paciencon kaj murmuris: “Ho, Jesuo Kristo!” Sed tiam tuj reagis la judo: “Ankau li estis unu el ni...” (*juda anekdoto de Josef Shemer*)

VOJAĜANTE TRA EŬROPO

Ĉiam, kiam vi planas iun malproksiman vojaĝon, vi komencas cerbumi pri ĝia allogo kaj ĝia intereseo, ĝia neceso kaj ĝia utileco. Vi certe pensas: ĉu vi havas sufiĉan tempon kaj monon por ĝi? Eble, tiam freneze ektumultas enkapo la kantvortoj, kaj vi ĝoje kaj fervore murmuris: “Ni vojaĝas, ni serĉas ĝojon, malproksimo logas nin...”. Ĉu vere vojaĝoj estas tiom allogaj? Ĉu estas ia vivoĝojo en ili? Ĉu ne nervozigas vin frapoj de fervojaj radoj? Ĉu ne lacigas vin multaj trajnŝanĝoj kaj daŭraj landlimaj pasport- kaj dogankontroloj, kiam ties oficistoj observeme okulumas vin, serioze foliumas la pasportajn paĝojn por stampi daton, vokas poŝtelefono klare pronancante la numeron de via pasporto iun nevideblan plian kontroliston, kiu informas pri rezultoj (feliĉe negativaj!)? Tiumomente via koro plirapidigas siajn batojn kaj altiĝas, supozeble, la sangopremo kaj via tuto plene streĉita atendas “verdikton”...

Certe, tiuj vojaĝaventuroj estas jam ne por ĉiuj eŭropanoj. Tie, en Eŭropo – ne



plu vizoj, landlim-kontroloj, doganistoj... Tamen signoj de pasinteco ĝis nun videblas: bariloj kaj dometoj de oficistoj ĉe antaŭaj interŝtataj landlimoj. Ilia trista, senviva aspekto memorigas la falon de la Berlina muro kaj la ŝanĝojn, kiuj okazis tra tuta Eŭropo en la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento. Al tio, kia iĝis la nuntempa Eŭropo kaj kio atendas ĝin en estonteco, kian sekurecan

kaj defendan politikon ĝi havu, ĉu efikan oficialan lingvopolitikon ĝi ellaboris kaj kiu lingvo estu la neŭtrala Eŭrolingvo, kaj al multo alia estis dediĉita la pasinta IF (Internacia Festivalo), kies ĉeftemo estiĝis “Eŭropo pligrandiĝinta”. La 2000-jara urbo Trier, la “Dua Romo”, en Germanio bonvenigis ĉirkaŭ 200 (aliĝis 207) geesperantistojn el 24 landoj de la mondo. Ĉi regiono estis grava ne nur por la Romianoj. Ĝi restas same signifa nuntempe: la ideo de “Eŭropo sen limoj” naskiĝis en la tute proksima luksemburgia Shengen, kie en julio 1990 ses landoj subskribis la kontrakton, kaj “Ŝengena vizo” famiĝis tutmonde. La ĉeftemo de IF estis prezentita per interesejaj kaj atentokaptaj prelegoj de B.Moon (Luksemburgio) “Eŭropaj institucioj en perspektivo”, U.Brandenburg (Germanio) “Eŭropo respondeca: la komuna eksterlanda kaj sekureca politiko de EU en konstitucia vakuo”, C.Tanc (Rumanio) “Eŭrolingvistiko”, E.Polakova (Slovakio) “Universitata klerigo en pligrandiĝinta Eŭropo” k.a. Same la ĝeneralklerigaj temoj trovis siajn aŭskultantojn. Ĉiu el la partoprenintoj de IF-22 havis varian elekton de prelegoj por sia kleriĝo kaj plezuro. Ekzemple, la problemoj de maljuniĝo kaj de pandemio estis diskutitaj

dum la prelegoj de H.Schicke (Germanio), la japan-devenaj Jumeiho-terapio kaj -gimnastiko sub gvido de B.Schumann (Francio) helpis malaperigi muskolan streĉon ĉe certaj interesitoj, je sia gitara akompano A.Pumpure (Latvio) konigis al ĉeestantoj emociajn naciajn kantojn.

Apartan mencion meritas ĉi-foja kromprogramo: dum la tuta semajno pri neŭtrala lingvopolitiko de EU kaj aliaj temoj diskutis AIS-anoj, kiuj sub la gvido de prof. d-ro H.Frank kontribuis al la IF-programo per pluraj eroj.

Dum IF estis organizitaj dunivelaj E-kursoj por tiuj, kiuj volis perfektigi siajn lingvosciojn, jam kutima tablotenisa turniro kaj ankaŭ aparta porinfana kurseto de ĵudo-lukto. Infanoj estis prizorgataj en "Ludejo" kaj "Klubejo" paralele al la ĉefa programo, tial iliaj gepatroj povis senĝene ĉeesti la IF-programerojn. Legemuloj povis plezurigi sin, foliumante kaj aĉetante E-librojn en la libroservo de Flandra E-Ligo (Belgio), kiu jam de multaj jaroj estas je dispono de IF-anoj.

Jarfino en la pligrandiĝanta Eŭropo estas kutime tempo de ferioj. Kaj multaj partoprenantoj uzis la eblon ripozi promenante tra la urbo kun kompetenta ĉiĉerono B.Moon aŭ aŭskulti vesperajn koncertojn preparitajn de la ĉiam ĝojplena kaj artistema JoMo (Francio), de la tiĥvinanoj M.Bronŝtejn kaj V.Vlasova, plenumintaj lirikajn kaj kortuŝajn kantojn, de la dagestananoj A.Junusov kaj E.Kurbanova kun relative ampleksa programo pri Dagestano kun kantoj. La tuttaga ekskurso al la najbara Luksemburgio celis konatiĝon kun la ĉefurbo, ĝia malnova parto kun la kazematoj kaj la grandduka palaco, kun la elstara ruĝa ponto kaj multaj viaduktoj.

Posttagmeze busoj veturigis la IF-anojn al la vinvilaĝo Shen-gen, kiu situas apud la limoj de Luksemburgio, Francio kaj Germanio. Neniu el venintoj al tiu ĉi historia loko preterlasis la okazon fotiĝi ĉe la monumento, simbollanta la subskribon de la "kontrakto de Ŝengeno".

La Silvestra balo ĉiam atendata kun



malpacienco donis eblon ne nur frandi la altprofesiajn kuiraĵojn, sed gustumi la diversspecajn vinojn kaj ĉampanon, aplaŭdi la elegantajn polonez-dancantojn kaj mem verve danci, bonvenigante la Novan jaron.

La tradicia “Knajpo”, sen kiu ne imageblas IF, estis taŭga loko por diversflanka pridiskuto de kiu ajn temo ĉe taso da kafo aŭ glaso da biero (laŭ gusto kaj bon-trovo). Funkcianta de mateno ĝis malfrua nokto la gasteja servo pere de IF-fonduso celis ankaŭ subvencii partoprenantojn el reformaj landoj laŭ propono de pasintjaraj partoprenintoj.

La supre priskribitan riĉan programon en la gastama junulardomo helpis efektivigi la diversnacia kaj diversaĝa teamo de helpemaj geesperantistoj, sed la ĉefa kaj fervora ĝia organizanto, daŭre nelacigebla kaj entuziasma HDP (Hanz-Dieter Platz) planas jam la vican, 23-an IF-on, en Saarbrücken. Ĉu ne tentas vin la temo “Francio”, kiu elvokas en la imago la mildan klimaton de Lazura marbordo, fabelajn kastelojn de Luarvalo, aromajn vinojn kaj neripeteblajn gustojn de francaj fromaĝoj? Aliĝu ĉe <www.internacia-festivalo.de> kaj regalu vin per IF kaj vojaĝo tra la daŭre pligrandiĝanta Eŭropo!

Tatjana Loskutova (Ivanovo)

LA 4-A NOVJARA RENKONTIĜO

La koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa kun ilia filino Karina, la mezepoka vespero de Christoph kaj Ines Frank kaj en plia vespero – la koncerto de Kim Henriksen verŝajne apartenis al la plej memorindaj eventoj de la 4-a Novjara Renkontiĝo de la asocio “EsperantoLand”. La aranĝo okazis de la 28-a de decembro 2005 ĝis la 8-a de januaro 2006 en Frankfurt ĉe Main, la naskiĝurbo de Goethe, al kies gepatra domo kondukis unu el la ekskursoj.

Partoprenis en la renkontiĝo entute 119 personoj, el kiuj 65 venis el eksterlando; entute reprezentigis 12 landoj. Tio certigis agrable internacian etoson por la multjaraj Esperanto-parolantoj kaj bonan ĉirkaŭon por kelkaj komencantoj kaj progresantoj, kiuj lernis kaj plulernis dum la renkontiĝo; la partoprenantoj povis libere elekti la partoprenantojn – ĉu nur komence, tuttempe aŭ nur fine post aliaj silvestraj aranĝoj.

Partoprenis trideko da infanoj inter unu kaj dek kvin jaroj el sep diversaj landoj, kiuj povis konstrui kastelojn, produkti feltajn ornamaĵojn, partopreni en mezepoka festo, pentri figurojn, sekvi lingvokurson aŭ kune amuziĝi laŭplaĉe.

Dum la NR oni povis aŭskulti prelegojn kaj kursojn pri diversaj temoj; okazis interalie amuza prezento de “La postdomo” fare de ties aŭtoro Istvan Ertl, legado de poemoj, diskuto pri “Esperanto kaj politiko”, Jogo-kurso, Sudoku-rondo kaj korusaj kunvenoj. Ekskursoj krom la menciita gvidis la partoprenantojn al la urbo Mainz kaj al la urboparto Höchst. Krome ne povis manki la silvestra festo, dum kiu meznokte oni grimpis al la kvina etaĝo de la domo por tie dum unu horo spekti ĉiufanke la pireknikaĵojn de la ĉi-kampe vere tre aktivaj frankfurtanoj.

Bildoj pri la NR troveblas ĉe <http://www.esperantoland.org/noro4_bildoj/>.

(esper-inform)

TRIKI ANSTATAŬ DIBOĈI

La vojaĝo por ni du (mi kaj mia edzo Bertrand) de franc-svisa limo al Xanten evidentiĝis sufiĉe longa kaj malfacila. En montaroj, de kie ni komencis nian vo-



jaĝon aŭte, neĝegis, poste neĝis la tutan vojon, kaj nur proksime de Germanio la neĝo fariĝis pluvo. Anstataŭ la planitaj 100 kilometrojn hore ni apenaŭ faris 50, pro tio atingis la IS-ejon nur preskaŭ je la 21-a horo.

La urbo Xanten, kiu gastigis ĉi-jare IS-on, estas unu el plej malnovaj germanaj urboj, eĉ kun restaĵoj de Romia epoko. Ĝi troviĝas tute proksime de Nederlando, kaj eble tiu ĉi fakto iĝis la

ĉefa kialo, ke ni povis intervidiĝi kaj konatiĝi kun multaj nederlandaj esperantistoj, parto el kiuj venis bicikle.

La temo de tiu ĉi IS estis “Religio, kulturo kaj vivfilozofio en la 21-a jarcento”. Kiel partoj de la tema programo estis: prelegoj kaj diskutrondoj pri religiaj kredoj de afrikanoj, ligoj inter filozofio kaj matematiko, kio estas kulturo, spertoj el Japanio kaj tutmonda etiko, ateismo, veganismo kaj aliaj. Alia parto nomiĝis movada programo kaj inkluzivis lingvokursojn, jam konatan seminarion “Flugiloj de malfacila vento”, prezenton de faka sekcio de TEJO – E@I, prelegon pri neŭtralismo de UEA kaj montradon de filmoj kaj fotoj pri pasintaj Esperanto-aranĝoj.

Por mi estis interese ekscii pri la prepozicio “na”, kiun oni proponas por uzo en Esperanto. Ĝi kvazaŭ anstataŭas akuzativon, se temas pri la propraj nomoj, ekz. “Saŝa amas Katja” – ja ne klaras, kiu kiun amas, ĉu? Nu, kaze kun “na” la frazo iĝus “Saŝa amas na Katja” – kaj tiam ja klaras ke ĝuste Saŝa amas Katja-n.

Lasta parto de la programo estis distra. Kaj ĝi kun siaj danckursoj, literaturo, kantoj allogis multajn partoprenantojn. Sed la pinto de la tuta IS iĝis trikado. La gvidantino de la kurseto pri trikado laboris, ŝajnas al mi, tutajn diurnojn. Trikis ĉiuj kaj ĉie: knabinoj, knaboj, organizantoj, helpantoj, eĉ prezidanto de unu Esperanto-organizo, nokte, tage, en gufujo kaj trinkejo. Rezultiĝis multe da belaj ekzemploj de trikarto.



La stelo de la nokta programo estis ĉi-jare Gufujo, kiu festis en lasta nokto la 10-jariĝon de la momento, kiam du germanoj ekigis ĝin dum unu el IS-oj. Krom 17 specoj de teo kaj diversaj kuketoj vizitantoj povis ĝui la noktan programon de Gufujo – organizitajn laŭtlegadojn kaj kantkoncertojn. La Gufujo eĉ venkis en spontane organizita konkurso inter Gufujo kaj trinkejo – kiu pli malfrue fermas siajn pordojn. Kaj imagu, nur unufoje trinkejo funkciis pli longe kaj havis pli multe da vizitantoj, kaj tiu nokto estis la Novjara nokto. Kiel nekutime por IS! Ne estis forta muziko kaj dancoj, oni ne aŭdis laŭtajn kriojn de drinkemuloj, ĝenerale apenaŭ iun ĝenis la trinkejo, kvankam ĝi troviĝis preskaŭ apud la ĉefa enirejo kaj en unu el ĉefaj koridoroj, kiun trairis ĉiuj partoprenantoj. Ĉu la kialo estas manko de homoj, kiuj kutimas pasigi noktojn en trinkejo kaj krei specifan etoson tie?

Krom la menciitaj programeroj okazis, kiel jam kutime por IS, naĝposttagmezo kaj tuttaga ekskurso, kiu ĉifoje estis en la sama urbo Xanten, kaj la novula programo. Kiel rimarkis respondeculoj pri la lasta – verŝajne, la novuloj tute malsentis la bezonon ke iu helpu al ili orientiĝi tra la aranĝo, ĉar neniu venis al la novula programo.

Aplaŭdojn mi donus al organizanto de la vespera programo. Bonaj koncertoj kaj kantistoj, inter kiuj estis *Dolchamar* kaj *JoMo*, Amir el *Esperanto Desperado* kaj *Krio de morto*, *Kadakar* kaj ankaŭ ne enuaj Novjara koncerto kaj Internacia vespero.

Ĝenerale la etoson de ĉi-jara IS mi povas nomi simple trankvila. Nek bruaj amuziĝoj nek skandaloj, al kiuj ĉiuj jam al kutimiĝis dum antaŭaj jaroj, nek problemoj ĉe organizantoj. Eĉ la ĉefo de la junulargastejo esprimis komplimentojn al partoprenantaro de la Internacia seminario! Ĉu la partoprenantoj kaj la organizantoj jam prepariĝas por la sekva, jubilea 50-a IS? Verŝajne, ja la teamo promesas ion grandiozan. Kaj se ili studos la erarojn de ĉiuj antaŭaj jaroj, eble, ili sukcesos.

Grimpi (Valentina Sidorova, Francio)

(fotoj de Łukasz Korczewski)



LA DELEGITOJ KREDAS JE LA FINA VENKO DE ESPERANTO!

rezulto pri enketo pri la fina venko

En novembro 2005 mi faris etan privatan enketon inter la delegitoj de UEA. Starigita estis jena (simpla) demando: Ĉu vi kredas je la “fina venko” de Esperanto (en la tradicia senco)? Oni estis petitaj simple respondi per JES aŭ NE (sen komento). Oni rajtis rifuzi la respondon aŭ ne respondi. Konkreta difino de la “fina

venko” intence ne estis donita, unue ĉar pri la konkreta kaj valida difino eblas diskuti, due mi lasis al la respondintoj la liberecon mem imagi al si kion por ili signifas la “fina venko” de Eo. Krome mi supozis, ke esperantistoj scias ĝenerale, kion signifas tiu esprimo. En la respondoj mi efektive ricevis la impreson, ke la plimulto bone sciis kion signifas “fina venko” de Eo (nur kelkaj malmultaj ne sciis). Por tamen doni iun difinon: “fina venko” signifas, ke Eo iam estos parolata de la homoj en la tuta mondo en formo de dua lingvo por ĉiuj (ĝenerala senco), aŭ ekz. ke ĝi estos oficiale enkondukita en la lernejoj, adoptitaj de registaroj kaj internaciaj organizoj (pli konkreta senco) ktp; vd. ekz. ĉe http://eo.wikipedia.org/wiki/Fina_venko. La respondintojn mi petis modifi sian opinion, kaze ke la de ili donita respondo neniel kongruas kun unu el la difinoj troveblaj sur la indikitaj retpaĝoj. Kaj mi invitis ilin komenti la temon. Due, mi intence rezignis pri komplika (sociologia) enketo por rikolti kiel eble plej multajn respondojn (dum iuj laŭdis tiun enketon, aliaj riproĉis, ke ĝi estas aŭ tro primitiva aŭ banala aŭ superflua). Por atingi mian celon tiu formo de enketo sufiĉis. Trie, mi garantiis, ke tiu enketo estas anonima kaj konfidenca. La respondintojn mi ŝatus “reuzi” por iu pli “serioza” enketo, kiun oni povus ellabori kun interesitaj fakuloj. Mi faris tiun ĉi enketon kaj bezonis la rikoltitan informon en kunteksto kun studo pri la internacilingva problemoj; la studo aperos en Svisa Enciklopedio Planlingva.

Pri la rezultoj mem: la mesaĝon ricevis 750 UEA-delegitoj – 576 viroj kaj 174 virinoj (kiuj estis hazarde elektitaj de mi el tiuj, kiuj havis retadreson en la Jarlibro de UEA) en 70 landoj. Por ne influi tiel aŭ alie la enketon mi principe ne sendis la demandon al personaj konatoj (kun kelkaj esceptoj) nek al la delegitoj en Svislando, kiujn mi konas preskaŭ ĉiujn persone.

Respondis entute, ene de 2-3 semajnoj, 180 personoj (122 viroj kaj 58 virinoj), tio estas 24%. De 570 (76%) ne venis respondo. Inter la 58 virinoj, kiuj reagis, 33 (56,9%) respondis per *jes*, 16 (27,6%) per *ne* al tiu demando, aliaj respondis *nek nek* (aŭ *nek jes*, *nek ne*), dubis, ne sciis kiel respondi aŭ rifuzis la respondon. Inter la 122 viroj, kiuj reagis, 72 (59%) respondis per *jes*, 34 (27,9%) respondis per *ne*, aliaj respondis *nek nek* (aŭ *nek jes*, *nek ne*), dubis, ne sciis kiel respondi aŭ rifuzis la respondon. Do entute: 105 el 180 (58,3%) respondis per *jes*, dum 50 (27,8%) neis la demandon.

Konkludojn kaj komenton mi persone dume ne volas fari. Ĉu tiu enketo estas utila, kaj kiuj konsekvencoj el tiu rezulto estas eventuale “tirendaj”, juĝu aliaj.

Andreas Kuenzli (Svislando)

Jen estas la plej interesaj respondoj (eble iom reprezentaj por multaj aliaj respondintoj, kiuj ne sendis komenton, aŭ por aliaj kiuj tute ne respondis). La respondoj estas cititaj ĉi tie senŝanĝe.

– Oni devas, unue, klarigi kion kompreni la vorton venki. Mi pensas ke estas pli produktema krei en esperanto, uzi la lingvo ol pridiskuti sian venkeblon. (*Sudameriko*)

– Esperanto jam venkis. (*orienta Eŭropo*)

– Mi kredas al venko de E-o, sed eble ne “tute fina”. (*orienta Eŭropo*)

– Laŭ mi Esperanto jam venkas, ĉar ĝi estas parolata tra la tuta mondo. Necesas do pluuzi ĝin. Ni ne esperu pri ia venko fina, kiu laŭ mi, igos Esperanton ne tio, kio ĝi estas nun. Konklude mi ne kredas je Fina Venko, ĉar la nuna stato de Esperanto estas tute bona. (*Afriko*)

– Mi kredas, ke finfine venkos Esperanto. (*Ĉinio*)

– “... mi kredas kaj kredas, neniam laciĝas pri tempoj estontaj pensante. Cent homoj ne kredas, mil homoj ne kredas, ... mi kredas kaj kredas konstante ...” Formoj, metodoj kaj strategioj povas esti diversaj, sed kiam kaj kiel ni venkos, neniuj povas respondi kaj eĉ ne aŭguri. Ne eblas aktuale respondi “Jes” aŭ “Ne”, sed ankaŭ ne eblas ne kredi. (*orienta Eŭropo*)

– Mi atente legis vian mesaĝon kaj iom miras. Ĉu vi volas pruvi, ke esperantistoj ne kredas je la “fina venko”? Ne ĉiuj esperantistoj komprenas la samon pri tiuj du vortoj: fina venko. Por iuj = ĉiuj homoj parolos esperanton tiam (kiu kredas je tio?). Por aliaj: esperanto estos ĉie serioze konsiderata. Ankaŭ dubinde; ĉiu opinio ĉiam altiras malajn opiniojn, estas homece! Ĝenas min la demando: ĉu jes aŭ ne, sen komento. Oni ne povas tiel abrupte respondi sennuance! Kiam estas konsulto/baloto estas almenaŭ tri respondoj: jes, ne, sin detenas (aŭ ne scias). (*okcidenta Eŭropo*)

– Antaŭ duona jaro mi sendis suban mesaĝon al deko da sociologoj esperantistaj. Bedaŭrinde mi ne ricevis eĉ unu reagon. Via enketo vekas mian intereson, sed laŭ sociologiesploraj mezuroj ĝi estas primitiva. Kiel estas via faka sperto pri enketoj? Ĉu vi estas interesita pri mia ideo pli science fari esplorojn pri la karaktero de la esperanto movado? (*okcidenta Eŭropo*)

– Mi ne povas respondi JES nek NE. Por esti sincera, mi devas diri MI NE SCIAS. Ĉiukaze mi ne kredas, ke la “fina venko” okazos dum mi ankoraŭ estas vivanta (mi jam estas 58-jaraĝa). Eble iam en la estonteco. (*okcidenta Eŭropo*)

– Mi ĉiam kredas en ia ‘venko’ de esperanto, sed ne la fina venko kiel ofte prezentita. (*okcidenta Eŭropo*)

– Mia respondo estas NE, sed mi devas aldoni ke via demando estas dusignifa. Unue, ĝi povas signifi: “Ĉu vi kredas ke la fina venko okazos?” Due, ĝi povas signifi: “Ĉu vi kredas ke eventuala fina venko estus beno por la homaro?”

– Mi ne povas doni al vi la simplan “jes” aŭ “ne” kiun vi petis, ĉar kvankam mi agnoskas ke ne okazis “la fina venko” en la tradicia senco, mi ankoraŭ kredas ke ĝi iel povus okazi, kaj mi asertas, ke ne-tradicia fina venko jam okazis.

– Bv pardoni min, ke mi respondas ne laŭ la peto (JES aŭ NE) kaj kun komento, sed mi deziras diri, ke la enketo mirigas min: ĉu vere ekzistas homoj, kiuj al tiu peto povas respondi per JES aŭ NE?

– Mi ne kredas al la fina venko en la tradicia senco, sed donas al ĝi eble 5-procentan ŝancon en la formo de EU-laborlingvo. Kaj tio signifus finon de la sociokultura flanko de E, kiel ni konas ĝin nun.

– Kial vi perdas vian (kaj mian!) tempon kun tiaj bagatelajoj. 98 % de la loĝantaro (eĉ en Svislando) scias nenion pri la lingva problemoj kaj pri Esperanto (aŭ havas tute falsan ideon pri ĝi). Uzu vian tempon por informi, konsciigi ĉirkaŭ vi, en via vilaĝo, urbo aŭ regiono, montru la pluson, kiun Esperanto alportis en via vivo.

Instigu kursojn en Universitatoj, multobligu viajn eksterlandajn kontaktojn pere de Esperanto. Riĉigu la Esperantan kulturon. Provizu la gazeton per artikoloj, kie vi montros faktojn, kiuj interesos la legantojn. Agu por la akcepto de Esperanto en la Svisaj kaj Eŭropaj ekzamenoj. Tiu esprimo “Fina venko” havas ian militistan “odoron”, des pli, la vorto “kredi” donas al ĝi ion religian, kiu absolute ne taŭgas! Por mi tio absolute ne gravas. Kiel diras Claude Piron, jam hodiaŭ, Esperanto donas al mi multe da ĝojo kaj plezuro... (*okcidenta Eŭropo*)

– Via demando ne estas metita saĝe, ĉar venko de esperantistoj okazos ankaŭ en la kazo, se venkos facila, do artefarita neŭtrala lingvo internacia, kiu ne estos Esperanto, aŭ estos iel reformita Esperanto. Kion vi opiniis per la noto “tradicia senco”, mi ne scias. Rezulto de mia komento: Al via demando mi ne respondas! Se vi estus uzinta anstataŭ “Esperanto” esprimon “artefarita neŭtrala internacia lingvo”, mi respondus jes, en futuro ĝi venkos. (*orienta Eŭropo*)

– La debato pri la FV jam havas pli ol jarcenton da historio, kaj estas interese ke por multaj (i.a. mi mem) tio signifas ke ĉiu estu informita pri E-o kaj ties valoro, kaj li/ŝi havu la liberon eklerni ĝin aŭ ne. Do ke E-o estu plenrajta kaj efika komunikalternativo. (*Sudameriko*)

– Mi opinias ke Esperanto similas por la lingvoj al dekeca sistemo por la matematikoj. Do, iam, Esperanto rolos la rolon pro kiu ĝi estis kreita. Sed kiam? Certe ne dum mia vivo bedaŭrinde. La sola kondiĉo por ke tia “fina venko” fiaskus, estus ke alia genio kreus pli bonan lingvan aferon ol Zamenhof, ĉu? (*okcidenta Eŭropo*)

– Mi ne kredas je tiu demando! Ne, mi ne kredas je la “fina venko” – mi laboras por almenaŭ “laŭeble maksimuma venko”... (*Sudameriko*)

– Estas absurde postuli respondon “per jes aŭ ne (sen komento)”. Nur vakcerbulo entreprenus tian “enketon”, kiu havus nenian ajn statistikan aŭ sciencan validon. (*okcidenta Eŭropo*)

– Estus interese unue diskuti pri “kiam, kial, kiel, en kiuj kampoj unue”. (*okcidenta Eŭropo*)

– Mi okupiĝas per Esperanto 53 jarojn en multaj funkcioj. Ĉu Vi opinias, se mi ne kredus je “fina venko”, ke mi tiel longe restus fidela al Esperanto? Tamen mi scias, ke mi jam ne vivos, kiam Esperanto venkos. (*orienta Eŭropo*)

– Mi deziras diri “jes”, sed eĉ se ne okazos, la provo valoras. (*Usono*)

– Mia respondo estas NE, mi kredas je utila funkcio de esperanto por komunikado tra mondo sed ĝi ne povas venki pro ekonomiaj interesoj de ĉiuj unuopaj landoj en la mondo (tiel mi substrekas ke laŭ mi ne temas nur pri ekonomie fortaj landoj). (*orienta Eŭropo*)

– Ĉu vi kredas ke la homaro iam vivos en paco kaj justeco, do ke neniu vivos en malriĉeco? Laŭ mi tio estas demando en la sama senco de via demando. Mi inklinas al “NE” sed tio ne signifas ke oni rezignu al klopodoj en la bona direkto. (*okcidenta Eŭropo*)

– Nu, same estus, se vi postulus respondi per jes aŭ ne al la demando: “Ĉu vi ankoraŭ batas vian edzinon?” Do tial mi elektas komenti kaj ne respondi. (*orienta Eŭropo*)

Bulteno de REU

EoLA OKAZOS EN JELEC

Post dumonata esplorado en kelkaj urboj en la konkurso de urboj-kandidatoj por okazigo de la festivalo EoLA en 2006 venkis Jelec. Tie oni sukcesis trovi ekonomie pli akcepteblan festivalejon. La konkludan decidon pri tio akceptis la Estraro de REU, al kiu sian parton de respondecado provizore transdonis la reformiĝanta REJM. EoLA-18 en Jelec estas planata por la komenco de majo 2006. La festivalo denove pasos memstare, sed ne kunigite kun REK. La kongreson en 2006 REU decidis entute ne okazigi kaj la Konferencon de REU enigi en la programon de Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-06), kiu plej verŝajne okazos apud Volgograd.

(esperanto-rus-informoj)

JAM LA TRIA UEA-PERANTO EN RUSIO

Al du jamaj UEA-kotizperantoj en Rusio aldoniĝis la tria: Viktor Kudrjavcev, Jekaterinburg. Ekde nun ankaŭ pere de li eblos oficiale sendi al UEA kotizojn kaj aliajn pagojn. Ke en unu lando estas du perantoj, estas sufiĉe ordinara afero por UEA, foje tiel estas eĉ en relative malgrandaj landoj. Sed tri en la sama lando – tio estas specife rusia rekordo.

La adresoj de UEA-perantoj en Rusio estas (laŭ la tt-ejo de UEA <<http://www.uea.org/alighoj/perantoj.html>>):

S-ro **Miĥail Ĉertilov**, p/k 21, 143006 Moskva-Odincovo-6; poŝta tel.: +7-916-2019437; rete <mikaelo@km.ru>.

S-ino **Halina Gorecka**, p/k 1205, 236039 Kaliningrad; h. tel.: +7-4012-656033; rete <sezonoj@gazinter.net>.

S-ro **Viktor Kudrjavcev**, p/k 132, 620041 Jekaterinburg; rete <komentanto@r66.ru>.

(esperanto-rus-informoj)

DELEGITIĜO NUN EBLAS ANKAŬ RETE

La Delegita Reto estas unu el la plej famaj kaj tradici-riĉaj servoj de UEA. En Jarlibro 2005 troviĝas la adresoj de 1784 delegitoj. Intertempe la nombro kreskis kaj meze de januaro estis registritaj precize 1800 delegitoj. Aktualajn informojn pri la delegitaro oni trovas en la reta Jarlibro ĉe <<http://reto.uea.org/>>, kiun UEA lanĉis en aprilo 2005. Individuaj membroj de UEA povas registriĝi kiel ĝiaj uzantoj ĉe tiu sama adreso, elektante unue siajn salutvorton kaj pasvorton. En la reta Jarlibro eblas facile serĉi delegitojn tra la tuta mondo kaj Fakdelegitojn laŭ iliaj fakoj. Oni trovas iliajn poŝtajn adresojn, kaj al tiuj delegitoj, kiuj havas retadreson, oni povas rekte sendi retmesaĝon, sen vidi la retadreson de la ricevanto.

Ĉu ankaŭ vi mem volas fariĝi delegito de UEA, se vi ne jam estas? Uzantoj de

la reta Jarlibro povas nun fari tion rete, plenigante retan respondilon en ĝia submenuo “Delegita Reto”. La respondilo iros aŭtomate al la Ĉefdelegito, se tiu ekzistas en la koncerna lando, kaj al la Centra Oficejo. Post aprobo fare de la Ĉefdelegito kaj la Ĝenerala Direktoro de UEA, informoj pri la novaj delegitoj estos konsulteblaj en la reta Jarlibro, dum antaŭe la delegitecoj povis efektive ekfunkcii nur post apero de la presita Jarlibro.

Tiuj, kiuj ne registriĝis kiel uzantoj de la reta Jarlibro sed tamen volus fariĝi delegitoj, povas elŝuti paperan respondilon ĉe <<http://uea.org/agadoj/dr.html>> kaj post ĝia plenigo sendi ĝin al sia Ĉefdelegito aŭ, se tiu en la lando mankas, al la Centra Oficejo. Krome, Ĉefdelegitoj kaj la CO volonte sendas presitan respondilon al ĉiuj interesitoj.

Oni povas aliĝi al REU rete, per reta aliĝilo. Por uzi ĝin eniru parton “Pri la Unio” en la ttt-ejo de REU kaj klaku la ligilon “reta aliĝilo”. La rekta adreso por veni al la aliĝilo estas <<http://www.reu.ru/pri/aligho.php>>. Estas uzeblaj E-lingva kaj ruslingva versioj. *(esperanto-rus-informoj)*

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

BONAJ NOVAĴOJ EL CO

La statistiko de la 31-a de decembro montras, ke en tiu tago UEA havis 6083 individuajn membrojn, kio superas per 227 la definitivan nombron (5856) en la antaŭa jaro. En la aprila numero de “Esperanto” aperos laŭlanda membrostatistiko. Ĝis tiam ankoraŭ venos iom da malfruaj kotizpagoj por 2005, tiel ke la definitiva nombro verŝajne estos ĉ. 6100 kaj la kresko – ĉ. 250. Ankaŭ la aligitaj membroj plimultiĝis en 2005. Estis 12253 aligitaj membroj, kio signifas kreskon je 105 kompare kun 2004, kiam ili nombris 12148. Depende de la fina nombro de individuaj membroj, la suma membronombro de UEA en 2005 estas ĉ. 18350. En 2004 ĝi estis 18004. En 2005 la membraro de UEA kreskis por tria sinsekva jaro. Espereble la kresko plu daŭros. Almenaŭ la komenco estas esperiga, ĉar ĝis la fino de 2005 CO registris jam 1980 individuajn membrojn por 2006. Fine de 2004 tiu nombro por 2005 estis 1768, tiel ke jam ĉe la starto ni avancis je 212 membroj kompare kun la antaŭa jaro. Iom fidindajn prognozojn pri membrara evoluo eblos tamen fari plej frue en marto-aprilo.

(komitato-de-uea)

UEA ĈE EŬROPA LINGVA KONSILIO

La 20-an de januaro okazis en Bruselo la 7-a eksterordinara ĝenerala asembleo de Eŭropa Lingva Konsilio (ELK), en kiu nome de UEA aktive partoprenis Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo. Antaŭ nelonge li estis elektita kiel konstanta reprezentanto de UEA ĉe ELK.

Eŭropa Lingva Konsilio estas sendependa asocio, kiu celas plibonigi la konon de lingvoj kaj kulturoj en Eŭropa Unio kaj pli vaste. En ĝi membras institucioj de supera edukado kaj asocioj kun specifa intereso pri lingvoj. UEA estas kunfondinto de ELK, en kies unua konferenco en 1997 en Lille, Francio, ĝin reprezentis Hans Erasmus. En postaj konferencoj UEA estis reprezentata de prof. Jouko Lindstedt

kaj d-ro Detlev Blanke. Partoprenante en la Konsilio UEA klopodas inkluzivigi almenaŭ kunkonsideron de Esperanto kiel unu el eblaj kaj studindaj solvoj por la multfaceta internacia komunikproblemo. Aparte valoraj estas la personaj kontaktoj kun lingvistoj kaj lingvopolitikaj fakuloj, kiujn tiu forumo ebligas.

La plej interesaj temoj en la Brusela asembleo, kiuj meritas pluan konsideron kaj partoprenon de UEA, estis ENLU (Eŭropa Reto por Antaŭenigo de Lingvolernado de Universitataj Studentoj), konsulto-dokumento pri antaŭenigo de lingvolernado kaj lingva diverseco, kaj la projekto DYLAN pri lingva dinamiko kaj regado de diverseco. Por pli efike kontribui al ilia prilaborado kaj por ĝenerale plifirmigisian rolon en ELK, UEA intencas partopreni en ĉiuj asembleoj de ELK pere de konstanta reprezentanto. Kiel konkludis Wim Jansen en sia raporto por UEA, “ELK moviĝas precize en tiu kampo, en kiu ni serĉas enireblon kaj rekonon”.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVA AFRIKA KOMISIONO ELEKTITA

La multjara aktivulo Jean Codjo el Benino, kiu nun loĝas en Kanado, gvidas la novan Komisionon de UEA pri Afrika Agado. La aliaj membroj de la Afrika Komisiono, kiel ĝi kutime estas nomata en la ĉiutaga uzo, kaj iliaj specialaj laborkampoj estas Antoine Kouablan Kouassi (Eburbordo; eksteraj rilatoj), Emile Malanda (DR Kongo; rilatoj kun afrikaj asocioj kaj grupoj), Francois Hounsounou (Benino; Afrika Oficejo, TEJO, ILEI), Jeremie Sabiyumva (Burundio; informado al ne-esperantistoj) kaj Moliere Ngangu (DR Kongo; turismo en Afriko).

La antaŭa Komisiono havis 12 anojn, sed por efika komisiona laboro tia kvanto montriĝis malpraktika, pro kio la Estraro revenigis la grandecon al tiu de la aliaj regionaj komisionoj de UEA. La Komisiono starigos pli grandan konsilan organon, Afrikan Konsilantaron, kiu konsistos el reprezentantoj de unuopaj afrikaj landaj asocioj kaj movadoj. Fine de decembro 2005 ĉesis validi la kontrakto de UEA kun Instituto Zamenhof pri funkciigo de la Afrika Oficejo en Lomeo, Togolando, ĉar tiu ĉi ne konsentis pri precizigoj en la kontrakto, kiuj celis pli bone konformigi ĝin al la Statuto de UEA. Nova sidejo de la Afrika Oficejo estas nun starigata en la apuda lando Benino, kaj UEA baldaŭ informos pri ĝia nova stabo. La sola oficeja retadreso estas <afrika.oficejo@uea.org>.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

JAM PLI OL 1300 REGISTRITAJ POR FLORENCO

Ĝis la 27-a de januaro la 91-a UK en Florenco nombris jam 1305 registritajn aliĝintojn el 51 landoj. Se la aliĝado en la dua kaj tria kotizperiodoj sekvos la saman ritmon kiel en antaŭaj jaroj, en Florenco kunvenos la tria sinsekva Unversala Kongreso, post Pekino kaj Vilno, kun pli ol 2000 aliĝintoj.

Ekde la komenco de la aliĝado la kongreslando Italio kaj la najbara Francio rivalas pri la unua loko de la statistiko. Ĝis decembro Italio tenis Francion malantaŭ si, sed en januaro la ordo almenaŭ portempe ŝanĝiĝis. Ĉe la pinto staras nun Francio kun 215 aliĝoj, dum Italio reprezentiĝas per 183 aliĝoj. Pliaj landoj super 100 estas Germanio kaj Japanio (respektive 127 kaj 117 aliĝoj). Poste sekvas Pollando

(54), Belgio (47), Brazilo (43), Svedio (34), Danio kaj Nederlando (po 32), Britio (31), Ĉeĥio kaj Rusio (po 28), Svislando kaj Usono (po 27) kaj Kroatio (26).

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2006

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Tjuljaĥov Spartak (Jakutio)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva EK MASI (+ 19 membroj): *Cobb Steve, Ĉajka Oleg, Gamaleja Anna, Gonĉarova Svetlana, Graĵdanova Oksana, Ĥlobistov Georgij, Ĥoĥljuškina Varvara, Isajeva Olĝa, Izjumenko Oleg, Ĵitĉenko Maksim, Paukova Anna, Prilepskaja Ksenija, Semjonova Natalja, Sigaĉov Aleksandr, Ŝtondina Anna, Ŝvedov Kirill, Talancev Aleksej, Talanceva Olĝa, Voronova Nadeĵda*

Volgograda E-klubo "Espero" (7 membroj): *Bikova Ljudmila, Dumler Vera, Guriljova Dina, Spicina Valentina, Ŝaligina, Taldikina, Vtorova Tatjana*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Alikin Viktor (Permj), Belenjuk Galina (Soĉi), Bepalov Vladimir (Soĉi), Blinov Aleksandr (Ĉeboksari), Ĉuprakova Nina (Moskvo), Demĉenko Jevgenij (Brjansk), Djomuškina Nina (Leningrada reg.), Edelŝtejn Vladimir (Moskvo), Gadirova Diljara (Toboljsk), Garibjan Sergej (Soĉi), Grankina Nadeĵda (Soĉi), Grankina Polina (Soĉi), Grišin Maksim (Moskvo), Ivaniŝĉenko Darja (Jelec), Ivanov Vjaĉeslav (Sankt-Peterburg), Jaĥina Alla (Krasnojarsk), Kirienko Andrej (Gomelj), Kondratjev Boris (Sankt-Peterburg), Kroter Stanislav (Sverdlovsk reg.), Liskov Andrej (Moskvo), Makarenko Valerij (Tverj), Masjukas Aleksandras (Murmansk), Melnikov Aleksandr (Rostov-na-Donu), Milner Aleksandr (Moskvo), Odincov Aleksej (Permj), Olejnikova Natalja (Soĉi), Opletajev Vladimir (Surgut), Osincev Aleksandr (Jekaterinburg), Poliŝĉuk Irina (Soĉi), Poliŝĉuk Valentina (Soĉi), Sapoĵnikov Oleg (Kirov), Smetanina Svetlana (Moskvo), Soniĉeva Larisa (Soĉi), Strelec Sergej (Ĉeljabinsk), Surnakin Anatolij (Moskvo), Ŝĉerbatih Irina (Jelec), Ŝerov-Ignatjev Ivan (Sankt-Peterburg), Ŝevĉenko Aleksandr (Moskvo), Tarĥan Ermita (Moskvo), Vasilenko Lidija (Moskvo), Vasiljev Viktor (Vladimir)

FAMILIAJ MEMBROJ

Ivaniŝĉenko Vsevolod (Jelec), Ŝĉerbatih Jevgenij (Jelec), Vasiljeva Natalja (Vladimir)

Ĉe la adreso <<http://reu.ru/dok/index.php?dok=membrolisto>> ĉiam eblas vidi aktualan liston de la membroj.

KOTIZOJ DE REU POR 2006

Individua kotizo – 80 rubloj (por eksterrusiaj loĝantoj – 8 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron kaj/aŭ Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj.

Dumviva kotizo – 2000 rub. (por eksterrusiaj loĝantoj – 200 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 30 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Kolektiva kotizo – 30 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 160 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 120 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj, escepte de la aligitaj kaj familiaj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membroj de REU aŭtomate iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn REGo-abonpagojn (poŝtmandate) sendu al:

Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область. La eŭraj kotizoj kaj rabatitaj REGo-abonoj pagendas al la konto **reu-a-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <kasisto@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

Tre riĉa usonano festis sian 95-jaran datrevenon. Li invitis al sia hejmo siajn 3 plej proksimajn amikojn: katolikon, protestanton kaj judon. Ĉeestis ankaŭ lia advokato. Li anoncis al ili jene: “Mi deziras heredigi al vi po 100 milionoj da dolaroj. Sed mi havas unu kondiĉon: dum mia enterigo ĉiu el vi devos meti en mian ĉerkon 100 mil dolarojn. Tio estos pruvo, atesto, kiu montros ke vi fidas min.” Post kelkaj monatoj li forpasis. Ĉe la tombo, sub la strikta kontrolo de la advokato, la katolika amiko enĉerkigis 100 mil dolarojn kontante. Same faris la protestanto. Tiam venis la judo, elprenis de la ĉerko la 200 mil dolarojn kaj enmetis anstataŭe ĉekon je la sumo de 300 mil dolaroj.

(juda anekdoto de Josef Shemer)

Eksciu, ke...

SARAJEVO INVITAS...

Vi certe jam scias, ke la 62-a IJK okazos inter la 6-a kaj la 13-a de aŭgusto 2006 en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. Loka Kongresa Komitato elkore invitas junajn rusiajn esperantistojn partopreni tiun ĉi eventon. Espereble multaj membroj de la rusia movado, ne nur gejunuloj, bonuzos la ŝancon viziti Sarajevo kaj samtempe partopreni IJK-n. Jen nova eblo ĝui eksterordinaran kongresan etoson kaj profundigi bonajn rilatojn inter niaj movadoj. La kunvivado de diversaj popoloj, religioj kaj kulturoj havas jam plurjarcentan tradicion en Sarajevo. Eĉ la teruraj okazaĵoj dum lastaj dek jaroj ne malharmoniigis la urbon. En la nuntempa malfermiĝo kaj akceptado de tutmondaj normoj, pro sukcesa konservado de siaj kutimoj kaj la tradicia kunvivado de malsamaj religioj, kulturoj kaj etnoj, Sarajevo ŝajne estas la plej bona loko por diskuto pri la nuntempeco, la tutmondiĝo kaj la konservado de tradicioj, multkultureco kaj toleremo. Grandaj olimpikaj montoj, fonto de la rivero Bosno, neolitika trovejo Butmir, riĉa nokta, kultura kaj arta vivo, bonega gastronomia oferto – ĉio troveblas nur duonhoron for de la kongresejo. Por precizaj informoj pri la aliĝreguloj kaj la kongresprenaro, bonvolu viziti nian retpaĝaron <www.esperanto.ba>. Bonvenon en Sarajevo!

La TEJO-estraro anoncis, ke la 63-a Internacia Junulara Kongreso en 2007 okazos en Hanoi, Vjetnamio de la 27.07 ĝis la 03.08.07. Pliaj informoj aperos dum la sekvaj monatoj.

Vildana Delalić, la Prezidantino de Loka Kongresa Komitato

LA 4-A BALTA ESPERANTO-FORUMO

Balta Esperanto-Forumo (BEF) estas renkontiĝo de esperantistoj el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro. Ĝin iniciatis la internacia revuo “La Ondo de Esperanto” kiel kultur-klerigan forumon. La unua Balta Esperanto-Forumo okazis en julio 2002 en Kaliningrad; en 2003 sekvis la dua Forumo en Olsztyn (Pollando), kaj la trian en 2004 akceptis Birŝtonas (Litovio). En 2005 BEF ne okazis pro la 90-a UK en Vilno, en kiu partoprenis preskaŭ ĉiuj aktivuloj el la (apud)Balta regiono. La kvara Balta Forumo okazos 22-27-an de julio 2006 en Bjalistoko – la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof. Ĝin kunorganizos Bjalistoka Esperanto-Societo (BES) kaj “La Ondo de Esperanto” helpe de Fondaĵo Ludoviko Zamenhof.

La cefa temo de la kvara Forumo estas “Zamenhof kaj la nuntempo”. En la programo estas antaŭvidataj: gazetara Konferenco, Solena inaŭguro kun salutparoloj, festprelego pri Zamenhof, prezento de la gastiganta regiono, Interkona vespero, piedekskurso en la urbo, laborprogramo, diservo en Esperanto, Podlahia vespero, tuttaga ekskurso, internacia konferenco “Zamenhof kaj la nuntempo”, arta programo. La laborprogramo enhavos internacian konferencon pri Zamenhof, seminariojn pri apartaj temoj, diversajn prelegojn, prezentadon de novaj libroj kaj

de “La Ondo de Esperanto”, serion de programeroj “Duonhoro kun...”, kvizon pri Zamenhof k.a. “Sezonoj” planas eldoni kaj prezenti en Bjalistoko libron kun socie gravaj tekstoj de Zamenhof.

Pri la programo bonvolu korespondi kun “La Ondo de Esperanto” – poŝte: 236039 Kaliningrad, p/k 1205; rete <sezonoj@gazinter.net>; telefone: +7-4012-656033. Pri la aliĝado kaj aliaj lokaj aferoj (ekskursoj, loĝado, invitiloj) bonvolu korespondi kun la prezidanto de BES Elżbieta Karczewska – poŝte: ul. Waszyng-tona 14 B m 119, PL 15-269 Białystok, Pollando; rete <elakarczewska@interia.pl>, <esperanto.bialystok@interia.pl>. La Forumo okazos, se antaŭ 01.05.2006 aliĝos almenaŭ 40 personoj. Aldonajn informojn legu ĉe: <<http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-ondo.htm>>.

Bonvenon al la urbo de Zamenhof!

(esperanto-rus-informoj)

FESTO EN 2006

“Festo”, la renkontiĝo de la fama asocio JEFO (Junularo Esperantumas en Francio), okazos en la esperantista “Kastelo Grezijono” de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 2006. La Kultura Domo de Esperanto “Kastelo Grezijono” troviĝas 100 kilometrojn sude de Parizo kaj estas facile atingebla.

Ĉi-foje la organizantoj kunlaboros kun “Eurokka” por krei pli agrablan muzik-programon. La fama muzikgrupo “Kore” ludos por ni! Koncertos ankaŭ aliaj grupoj: la rokbanda “Nigra Flago”, la repgrupo “Pafklik”, la ĵazgrupo “Melono”... Krom la koncertoj en la programo estos: teatraĵo, nokto de la Esperanta kino, prelegoj ktp. La asocio “Libereco por lingvo” havos surlokan renkontiĝon kaj proponos programerojn.

La partoprenkosto por rusianoj estas de 30 ĝis 100 eŭroj (depende de la aĝo kaj aliĝperiodo), por la manĝoj aldonendas 60 eŭroj. Eblas aliĝi ĉe la adreso <<http://festo.esperanto-jeunes.org>>. Por ricevi ĝeneralajn informojn uzu <cyrille@esperanto-jeunes.org> kaj +33-677281325; por proponi programerojn kaj ricevi rabatojn – <aleks@esperanto-jeunes.org> (dumtaga programo) kaj <melaine.desnos@laposte.net> (dumnokta programo).

(esperanto-l)

LA PLEJ AMASA E-GRUPO ĈE YAHOO

Antaŭ iom da tempo la instrua retlisto por ruslingvanoj <esperanto-kurso@yahoo.com> iĝis la plej amasa E-a retgrupo ĉe Yahoogroups – inter preskaŭ 400 aliaj grupoj. Nun en ĝi estas 965 abonantoj: lernantoj kaj instruistoj.

La modelo de instruado en la grupo estas sekva (tiun modelon unue aplikis en sia listo, nun jam ne ekzistanta, “esper-instru” Nikolao Griŝin): ĉiu novaliĝanto ricevas la tutan lernolibron de B.G.Kolker kaj devas sendi la plenumitajn ekzercojn al la listo. Tiun sendaĵon ricevas ĉiuj abonantoj de la listo. Same en la liston estas sendata la ekzerco korektita de iu el la instruistoj (tiu, kiu estas iomete pli libera en tiu momento). Kaj ankaŭ tion ricevas ĉiuj.

Rezulte oni havas siaspecan grupan senton en la listo – kvazaŭ tio estus ordi-

nara ĉeesta kurso. Kaj la formulo “Esperanto + grupo” kreas el novuloj esperantistojn. Ekzistas jam dekoj da aktivuloj, kiuj aperis – almenaŭ en la reta Esperantujo – dank’ al la listo.

Dum lastaj monatoj inter la plej aktivaj instruistoj en la listo oni povas noti Aleksandr Osokin (Sankt-Peterburg), Anna kaj Mati Pentus (Moskvo), Maksim Grišin (Moskvo), Valentin Melnikov (Moskvo), “Galaxy Dweller” (Sankt-Peterburg), Vladimir Kočetkov (Kovrov). Kelkaj el ili mem lernis la lingvon en la kurso.

Andrej Grigorjevskij (Ĉuvaŝio)

EKFUNKCIIS E-VERSIO DE VIRTUALA MUZEO

La 10-an de januaro en Portugalio estis oficiale inaŭgurita la E-versio de Virtuala Muzeo de Bildodesegnoj. La “unuana viziton” al la E-a versio de la Muzeo faris la portugala ministro pri financoj. E-o iĝis la tria versio post la portugala kaj la angla. La adreso de la Muzeo estas <www.cartoonvirtualmuseum.org>.

(landa agado)

POVILAS JEGOROVAS, LA ESPERANTISTO DE LA JARO 2005

Internacia sendependa magazino “La Ondo de Esperanto” (Kaliningrad) iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. En 2001 laŭreatiĝis Osmo Buller, kaj en 2002 – Michel Duc Goninaz. En 2003 elektita estis Dafydd ap Fergus. Kiel la esperantisto de la jaro 2004 estis elektita profesoro Helmar Frank.



Ĉi-jare la kandidatigantoj proponis 18 personojn, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn. Rezulte la plej multajn voĉojn (10) ricevis kaj estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2005 Povilas Jegorovas, advokato el Kaunas, prezidanto de Litova Esperanto-Asocio.

La internacia komisiono elektis s-ron Povilas Jegorovas la Esperantisto de la Jaro 2005 pro la bonega preparado kaj sukcesa realigo de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto kaj de la 4a Nibtobe-Simpozio en Vilno; pro la ekzemplodonaj rilatoj kun litoviaj aŭtoritatoj, intelektuloj kaj amaskomunikiloj, danke

al kiuj Esperanto progresas en Litovio; pro la kunordigo de eldonado de gravaj libroj pri Esperanto en la litova lingvo.

La solena proklamo okazis la 17-an de decembro en Kaunas, en la tradicia Zamenhofa Tago kun ĉeesto de pluraj esperantistoj kaj ĵurnalistoj (kvin televidoj sendis siaj raportistojn), kiuj ĝoje kuntostis je la sano de la Esperantisto de la Jaro 2005. Kazys Starkevicius, membro de la litovia parlamento, atentigis pri la graveco de la agado de la Litova Esperanto-Asocio. Halina Gorecka, kiu donis al Jegorovas la diplomon, emfazis, ke unufoje la honoran titolon ricevis orient-eŭropano kaj ke neniam pli frue estis distingita prezidanto de la landa asocio kaj kongres-organizanto. Respondante al la gratuloj, la laŭreato klarigis, ke li akceptas la honoran titolon kiel rekonon de la tuta landa movado en Litovio.

Halina Gorecka (Kaliningrad)

LA KONFERENCO DE ILEI

La 39-a ILEI-Konferenco okazos de la 25-a ĝis la 29-a de julio 2006 en Parma (Italio). Ĝia temo estos: “Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj”, tre bele komplementa kun la kongresa temo de UK. Pri la Konferenco vi povas vidi detalajn informojn ĉe http://www.ukflorenco2006.it/unikodo/til_ar/ilei, kie oni informas pri ĝiaj ĉefaj trajtoj: kolegeca etoso en intima rondo, plibonigo de instru-kapabloj de la partoprenantoj, moderkosta loĝado kaj varia programo, agrablaj vesperoj kaj tuttaga ekskurso survoje al UK.

(Informitale)

SUKCESA E-KURSO EN JEKATERINBURG

La 15-an de decembro, ekzakte en Zamenhof-tago, 6 novuloj finis la elementan kurson de Esperanto. La kurso estis lanĉita ĉe la Pedagogia Univestitato de urbo Jekaterinburg, kaj ĝin gvidis studento de la tria jaro de fremdlingva fako Aleksandr Osincev. Ĉiuj kursfinintoj ricevis la atestojn pri la fino de la kurso en solena ceremonio dum Zamenhof-festo, okazinta en Domo de Paco kaj Amikeco la 18-an de decembro. La novuloj prezentis kelkajn koncertajn programerojn kun spritaj humuraj teatraĵetoj, violonludo kaj kantado.

La ĉeestantoj varme akceptis la junan generacion kaj plezure bonvenigis la novulojn en sian rondon. Estas tre ĝojiga la fakto, ke ĉiuj kursfinintoj decidis plu lerni la lingvon en daŭriga kurso, kiun planas okazigi A.Osincev ĉe la Universitato post la vintraj ferioj. La universitata estraro favore rilatas al iniciatoj de A.Osincev pri Esperanto.

Raja kaj Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg)

184 PETOJ AL KORESPONDA SERVO MONDSKALA EN 2005

Koresponda Servo Mondskala de UEA ricevis pasintjare 184 korespondpetojn. En la 90-aj jaroj la nombro de petoj fluktuis ĉirkaŭ 400, sed en 2002 ĝi falis al 220 kaj ekde tiam poioj plu falis ĉiujare. La falon unuavice kaŭzis rapida plivastiĝo de retpoŝto je la kosto de tradicia letera korespondado. Parte tio tamen rezultis ankaŭ el nesufiĉa popularigo de KSM fare de Esperanto-gazetoj, kursgvidantoj,

kluboĵ, ktp. La petoj venis el 44 landoj. La plej granda klientaro de KSM ĉiam troviĝis en ĝia hejmlando Francio, kiu en 2005 liveris 29 petojn. La duan lokon surprize okupis Usono, kiu pli ol triobligis sian nombron de petoj kompare kun la antaŭa jaro: el 5 al 16. El Kubo kaj Rusio venis po 13 petoj, el Brazilo – 11. La servojn de KSM komencas uzi ankaŭ tiuj, kiuj volas korespondi nur rete: de 3 en 2004 la nombro de tiaj petintoj kreskis al 7 en 2005. Entute 62 korespondemuloj (33,7%) indikis apud poŝta adreso ankaŭ retadreson, dum en 2001 ili estis nur 9% el ĉiuj klientoj de KSM.

UEA starigis Korespondan Servon Mondskalan en 1957. En 2001 ĝia kontribuado al internacia amikeco estis rekonita per la esperantista pacpremio Premio Deguĉi. En 1990 la prizorgadon de KSM transprenis s-ro Francois Xavier Gilbert. La adreso de KSM estas: B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio. Informilon kaj aliĝilon oni povas peti kontraŭ unu internacia respondkuponon, aŭ konsultante la retejon de KSM ĉe <www.multimania.com/kosomo>. Por rekte ricevi adresojn de korespondemuloj, oni sendu du respondkuponojn kun detalaj indikoj pri si mem kaj pri dezirataj plumamikoj.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

EKSPOZICIO DE E-LIBROJ EN ŜUMERLJA

En la urba infana biblioteko de Ŝumerlja (Ĉuvaŝa Respubliko) la 16-an de decembro ekfunkciis ekspozicio de infanaj libroj en Esperanto. Estas prezentitaj ankaŭ kelkaj E-aj KD-oj, kaj spekteblas infana lingvokurso “MAZI en Gondolando”. La ekspozicion aranĝis Natalja Grigorjevskaja. La ruslingva informo pri la ekspozicio legeblas en la retejo de la Ŝumerlja urba domo de infana kreado ĉe la adreso <<http://dom-dt.nm.ru>>, parto “Novaĵoj”.

(esperanto-rus-informoj)

4-A EŬROPA MEDICINA ESPERANTO-KONGRESO

Inter la 22-a kaj la 26-a de julio 2006 okazos la 4-a EMEK en la urbo Hodmezovasarhely (Hungario). Temoj: Movorganaj malsanoj: prevento, kuracado, rehabilitado. Kor- kaj angiosistemaj malsanoj. Imunaj malsanoj. Homo kaj la naturo. Yumeiĥo-memorkunsido. En la programo: solena malfermo; kultura prezentado sur la ĉefplaco; filmprezentado; kongresa balo; fakprelegoj; muzika programo; folkloro prezentado; ekskurso al hungara historia loko Opusztaszer, faka vizito de la klinikoj. Prezoj: registriĝa kosto ĝis la 28-a de februaro: 20 eŭroj, ĝis la 30-a de aprilo – 30 eŭroj, ĝis la 30-a de junio – 40 eŭroj. La partoprenkotizo (kiu inkluzivas 5 tranoktojn en 3-4-litaj studenthejmaj ĉambroj, trifojan manĝadon, ekskurson kaj enirbiletojn) estas 150 eŭroj. Aliĝilojn kaj informojn oni povas peti de S-ino Katarina Farago, HU-6801 Hodmezovasarhely, Pf. 89, Hungario; retadreso <farago.kata@espmmed.hu> aŭ <4a.emek@espmmed.hu>. Prelegojn oni povas anonci ĉe D-ro Imre Ferenczy <iferdr@t-online.hu>.

(landa agado)



DAGESTANO KAJ ESPERANTO EN NILVANGE

Francio-Loreno, 2006/01/05

La muzika kaj kultura vespero organizita komune de asocioj “Forum des Citoyens” (Forumo de la Civitanoj) kaj Esperanto-Thionville okazis malgraŭ malfacilaĵoj faritaj al niaj gastoj. La du animantoj de tiu vespero, ĵurnalisto Abdurahman Junusov kaj kantistino kaj dancistino Eljmira Kurbanova, restadis dum du semajnoj en Moskvo por akiri vizojn ĉe la germana konsulejo. Pro tio ili perdis multe da tempo. Ili ne povis etapi en Pollando kaj bedaŭrinde restadis nur iom da tempo en la Internacia Festivalo en Germanio. Sed ĉi tie ili almenaŭ sukcesis prelegi kaj kanti plezurigante la publikon. Finfine ĉio estis en ordo por nia aranĝo, ĉar la du loĝantoj de tiu aŭtonoma respubliko de la Rusia Federacio alvenis en Nilvange por konigi al ni sian landon.

Ĉirkaŭ kvindek atentemaj spektantoj ĉeestis tiun vesperon. Abdurahman Junusov, kiuj estis ĉefredaktoro ĉe dagestana televida programo, prelegis en Esperanto, kaj samtempe Bernard Vivier tre bone kaj fidele interpretis. La paroloj de Junusov estis agrabligitaj per belegaj fotoj kaj videofilmo. “Dagestano estas paradiza tero”, li komence diris. Tiu lando, kies amplekso



estas 50000 km², kie vivas 2 milionoj da loĝantoj, situas rande de la Kaspia Maro kaj ĉe la piedo de Kaŭkazio. Oni parolas 70 lingvojn kaj loĝas samtiom da etnoj. Junusov rimarkigis ke neniu milito okazis inter la diversaj etnoj. En tiu montara lando la plej supra pinto altas 4500 metrojn, sed estas ebenaĵoj kaj mallarĝaj valoj. Dagestano posedas multajn naturajn riĉaĵojn: nigran kaviaron, petrolon kaj gason. Nun politike kaj ekonomie tiu lando spertas latentan militon. Bandoj teruras la homojn eĉ per bomboj en la centro de la ĉefurbo Maĥaĉkala. La senlaboreco ege kreskis, kaj la salajroj estas malpli altaj ol en aliaj partoj el Rusio.

En la dua parto Eljmira Kurbanova, kantistino kaj dancistino el la kvaropo “Eridano”, tre populara en sia lando, aperis en Nilvange la unuan fojon en Francio. Ŝi kantis en Esperanto, en la rusa, en la kartvela kaj en dagestanaj lingvoj diversajn tradiciajn popularajn kantojn el sia lando. Ŝi estis varme aplaŭdita de la publiko, konkerita de tiu mirinda lando kuŝanta inter Eŭropo kaj Azio. Eljmira, komen-cantino en la internacia lingvo, vojaĝis la unuan fojon eksterlanden, sen siaj

koleginoj, tamen kantis en Esperanto antaŭ internacia publiko! Ŝi diris al ni ke ŝi konas kvar lingvojn kaj kantas en 10 lingvoj!

La morgaŭan tagon la gastoj estis varme akceptitaj de la Esperanto-klubo de Metz kaj radioamatoroj en la kultura domo. Same Aĥman iom prelegis kaj Eljmira mirigis nin per sia belega voĉo kaj akompanis sin mem per piano. Tridek personoj aplaudis ilin kaj fine niaj gastoj povis gustumi la reĝan kuketon kaj bonan vinon!



Ekde la jaro 2001 nia asocio Esperanto-Thionville kun Forumo de la Civitanoj en Nilvange organizis kvar vesperajn kulturprogramojn dank' al la internacia lingvo kaj Esperanta komunumo. Venis plezurigi esperantistojn kaj neesperantistojn preleganta paro el Ĉeĥio – gesinjoroj Pištora, Mikaelo Bronštejn – bardo el Rusio, “Kajto” – gekantistoj el Nederlando, Abduraĥman Junusov kaj Eljmira Kurbanova – niaj dagestanaj geamikoj. Ĵurnalistoj raportis pri tiuj eventoj, kaj okaze de la koncerto de “Kajto” loka televidilo faris interesan videoreporton.

Bruno Henry (Franco)

FORPASIS POUL THORSEN (1915-2006)

La 30-an de januaro forpasis la dana Esperanto-poeto Poul Thorsen en la aĝo de 91 jaroj. Thorsen, kiu profesie estis instruisto, lernis Esperanton en 1931 kaj jam baldaŭ ekaktivis en la laborista Esperanto-movado. En 1937 li unuafoje partoprenis SAT-kongreson en Roterdamo, invitante tie al partopreno en la Kopenhaga kongreso en 1939, kiun li organizis kun Paul Neergaard. En la 50-aj jaroj Thorsen gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. De 1954 ĝis 1962 li gvidis la eldonejon “Koko” kaj estis kunredaktoro de la altnivela kultura-literatura revuo “Norda Prismo” de 1957 ĝis 1974. Liaj ĉefaj eldonitaj verkoj, kiujn ofte karakterizas satira humuro, estas la poemaroj “Rozoj kaj urtikoj” (1954), “Sen paraŝuto” (1963), “Gruk” (de Kumbel, 1956), “Pluk: miniaturoj” (1960); “Du el” (kun Marjorie Boulton, 1985), la rakontaro “Stokita vino” (1995) kaj la rememoroj “Babile kun mi mem” (1996). Grandaj hobiaj de Poul Thorsen estis, kiel li mem diris, “ekscesa vojaĝemo” – li vizitis pli ol 80 landojn – kaj fungoj, pri kiuj li longe ankaŭ estis Fakdelegito de UEA. Membro de UEA li estis ekde 1947. En 1997 li kaj lia edzino Roma donacis al UEA grandan monsumon por starigi la kason “Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen”, kiu intertempe helpis kelkdekon da Esperanto-bibliotekoj por pliriĉigi siajn kolektojn.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

 kultúra revuo

En E-parto de la ampleksa muzika ttt-ejo *MusicExpress* aperis informoj pri la serio de muzikdiskoj “Oraj kantoj”, kiuj enhavas la plej bonajn sovetaĵajn kaj rusiajn E-kantojn. La rekta ligo estas <www.musicexpress.com.br/orajkantoj_eo>. Krom la ĝeneralaj informoj pri la serio, tie troveblas ankaŭ la titoloj, kantolistoj kaj kovrilaj bildoj de ĉiuj kvin diskaj. Por ĉiuj diskaj estas prezentitaj ankaŭ po 3 kantoj elŝuteblaj kaj aŭskulteblaj en la formato mp3.

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2006

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo – en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2006. Por filmo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 2006. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, p/a Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; rete <michela.lipari@tiscali.it>. La konkursaĵoj (krom infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras. Se oni sendas la konkursaĵojn rete, oni indiku la elektitan pseŭdonimon.

Premioj: Unua premio: 220 eŭroj; dua premio: 154 eŭroj; tria premio: 88 eŭroj; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita): 154 eŭroj; Infanlibro de la Jaro: 462 eŭroj.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ rete ĉe <uea@co.uea.org>. Ĝi legeblas ankaŭ en la TTT-ejo <www.uea.org>.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

LA REZULTO DE LIRO-2005

Je la Zamenhofa Semajnfino en Kaliningrad estis anoncita la rezulto de la tradicia literatura konkurso Liro-2005, organizita de “La Ondo de Esperanto”. La seppersona juĝkomisiono (Aleksiej Birjulin, Sten Johansson, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korjenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda) ricevis 37 konkursaĵojn de 23 aŭtoroj el 15 landoj – Britio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Irano, Luksemburgio, Mongolio, Pollando, Rumanio, Ruslando, Svedio, Ukrainio, Usono. Neniam pli frue konkursaĵoj venis el tiom multaj landoj.

La rezulto de Liro-2005

Originala prozo

Laŭreato: **Paul Gubbins** (Britio) pro “Amikaro”. Laŭdaj mencioj: **Leif Nordenstorm** (Svedio) pro “ttt.mondplibonigo.org”; **Jean-Marie Ries** (Luksemburgio) pro “Apenaŭ birdebla fileĉo”; **Lenke Szász** (Rumanio) pro “Telefoni al vi”; **Tatjana Vŝivceva** (Ruslando) pro “Jubileo”.

Originala poezio

Laŭreato: **Alfred Knapp** (Germanio) pro “En la vespera horo”. Laŭdaj mencioj: **Alfred Knapp** (Germanio) pro “Pegazo-flugo”; **Ludmila Orajevskaja** (Ukrainio) pro “Muziko”; **Tatjana Vŝivceva** (Ruslando) pro “Venos mi” kaj “La antaŭvintra melankolio”.

Traduka prozo el la rusa lingvo (Всеволод Гаршин. Красный цветок)

Laŭreato: **Mihail Povorin** (Ruslando).

Traduka poezio el la rusa lingvo (Раиса Кудашова. В лесу родилась ёлочка)

Laŭreato: **Tatjana Auderskaja** (Ukrainio).

Traduka prozo el la angla lingvo (Mark Twain. Journalism in Tennessee)

Laŭreato: **Jean-Luc Tortel** (Francio). Laŭda mencio: **Paul Gubbins** (Britio).

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. Konforme al la regularo la organizantoj rezervas al si la rajton ĝis 1-a de januaro 2008 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en “La Ondo de Esperanto”, libroforme kaj elektronike.

Gratulon al la laŭreatoj! Dankon al la partoprenintoj!

Halina Gorecka, sekretario de Liro-2005
(esperanto-rus-informoj)

Anton Pavloviĉ Ĉeĥov. Onklo Vanja. El la rusa tradukis Mikaelo Povorin. Literatura suplemento al la gazeto REGO, Moskvo, 2005. 44 p.

A.P.Ĉeĥov, ŝajne, estas la plej konata eksterlande rusa literaturisto. Klare, ke la nomoj de L.Tolstoj kaj F.Dostojevskij estas pli ofte uzataj kaj rememortaj, kiam temas pri la rusa literaturo; sed, sincere dirate, ĉu multaj legis ilin? Ja longaj verkoj... en nia dinamika tempo... Sed Ĉeĥov, kiu verkis ĉefe kurtajn rakontojn, estas pli komprenebla kaj pli proksima al eŭropa, ĉina, japana animo. Oni ofte tradukas lin al diversaj lingvoj... kaj foje eĉ legas!

Ricevis li sian merititan agnoskon ankaŭ en Esperantujo. En 2004 estis tradukita lia teatraĵo “Ĉeriza ĝardeno”, kaj en 2005 aperis traduko de dua el la kvar liaj famaj teatraĵoj, la “Onklo Vanja”. Plenumis ĝin fama poeto kaj bardo M.Povorin. Kaj bone plenumis.

La subnomo de la verko estas: “Scenoj el vilaĝa vivo en kvar aktoj”. La teatraĵoj de Ĉeĥov tute ne konformas al la kutima, tradicia formo de teatraĵo, kiun ni vidas en verkoj de Shakespeare, Schiller, Moliere, G.B.Shaw aŭ iu ajn el klasikuloj. La ĉefa postulo al klasika dramo – vigla kaj streĉa intrigo kiel spino de la tuta verko, la rakont-linio kiel risorto, kiu forte frapas ĉe l’ finalo. Nenion tian oni trovas en dramoj de Ĉeĥov. Nek akra intrigo, nek pasioj... Fakte, pasioj bolas – sed nur interne. Oni ne povas indiki ĝuste la ĝenron de liaj teatraĵoj; verŝajne, ili estas tragedioj de la plej ordinaraj homoj: tiaj ĉiutagaj tragedioj, kiujn neniu rimarkas: nemajestaj, nelaŭtaj, nebrilaj. La tragiko de ĉiutageco korodas la vivojn; kaj samtempe la flamo de talento, de alta alvokiĝo lumigas la vivojn kaj animojn de tiuj plej ordinaraj homoj.

Ĉeĥov estas unu el fondintoj de nova literaturo, almenaŭ en sfero de teatraj verkoj. En liaj teatraĵoj gravas paŭzoj: ili kvazaŭ donas la duan dimension al simplaj frazoj, kondukante nin de ŝajne trivialaj eldiroj al ilia profunda signifo, montranta la internan vivon, la verajn sentojn de la protagonistoj.

“Jes, delonge oni ne kuiris ĉe ni nudelojn”. Paŭzo. “Sed iel videblas, ke la tuta vivoordo estas rompita.”

Aŭ: “*Vojnickij*. Mi silentas. Silentas kaj pardonpetas. Paŭzo. *Jelena Andrejevna*. Bona vetero estas hodiaŭ... Ne varmegas... Paŭzo. *Vojnickij*. En tia vetero estas bone pendumi sin...”

Vera intrigo de verkoj de Ĉeĥov okazas en la mensoj, en la interna vivo. Li mem diris, ke li volas ne verki “bonan dramon”, sed demonstri en la sceneja formo la vivon, kie: “homoj tagmanĝas, nur tagmanĝas, sed en tiu tempo kreiĝas ilia feliĉo aŭ frakasigas iliaj vivoj”. Post Ĉeĥov-aj verkoj oni nomas tiun novan formon de drama strukturo “interna intrigo”: ĉiu protagonisto estas enmergiĝinta en sian propran mondon, propran mensocirkon, ĉiu elradias ondon de sia specifa longo, kaj ĉio kune faras strangan simfonion. Apartaj sonoj interplektiĝas aŭre, jen kunproksimiĝas en akordo, jen disiĝas... sed ĉiu estas sola kaj soleca. En dramoj de Ĉeĥov forestas feliĉa amo: tiu, kiu amas, estas malfeliĉa, kaj feliĉas nur senanimaj egoistoj, tute ne kapablaj ami. Eble, ankaŭ pro tio dramoj de Ĉeĥov estas kompre-

neblaj al nuntempa publiko; li vere estas unu el fondintoj de nuntempa literaturo.

La paroloj estas strangaj sed neniam hazardaj. Ĉiu plej triviala rimarko karakterizas la animstaton de l' persono. Ekzemple, en la genia finalo de "Onklo Vanja" – post paŭzoj, provo de suicido, ardaĵ dialogoj – evidentiĝas, ke la vivkatastrofo de la onklo Vanja esprimiĝas ne en tiuj efektaj scenejaj agoj, sed en ŝajne preteraj vortoj de Astrov: "He, verŝajne en tiu Afriko nun estas varmego – terura afero!"

Ĝenerale, la teatraĵo plenas de "flugilhavaj esprimoj", kiuj nun iĝis konataj al ĉiu klera rusa homo. "Ni vidos la ĉielon plenan de diamantoj" – oni diras pri ple-numo de plej altaj aspiroj. "En la homo ĉio devas esti belega: kaj la vizaĝo, kaj la vesto, kaj la animo, kaj la pensoj" – la citaĵo eĉ estis trivita en la sovetia tempo.

Frapmirigas ankoraŭ unu trajto de tiu ĉi verko. Ĉirkaŭ 30 jarojn antaŭ la apero de la vorto "ekologio", des pli de la nocio mem, Ĉeĥov per la buŝo de doktoro Astrov, fakte sia "alter ego", proklamis neceson de amo, zorgo kaj estimo al la naturo.

"Astrov. La rusaj arbaroj krakas sub toporoj, pereas miliardoj da arboj, malpleniĝas la loĝlokoj de bestoj kaj birdoj, malprofundiĝas kaj sekiĝas riveroj, malaperas senrevene mirindaj pejzaĝoj... Nur malprudenta barbaro povas bruligi... tiun belon, detrui tion, kion ni ne povas krei. La homo estas dotita per racio kaj krea forto por multigi tion, kion oni donis al li. Tamen ĝis nun li ne kreadis, sed destruis. Arbaroj pli kaj pli malmultas, riveroj sekiĝas, sovaĝaj bestoj formortis, la klimato estas difektita, kaj ĉiutage la tero iĝas pli kaj pli malriĉa kaj hida".

Siatempe la publiko ne komprenis tiujn vortojn, eĉ primokis ilin – tiel malkutimaj kaj strangaj ili ŝajnis. Sed kiel aktualaj ili estas nun! Vere, Ĉeĥov antaŭvidis ne nur novan literaturon, sed ankaŭ novan vivon, – kaj tial liaj komedioj estas tiel tristaj...

Li mortis antaŭ pli ol cent jaroj (en 1904); sed liaj verkoj temas ankaŭ pri ni. Ili ne restis limigitaj en sia epoko, ili bezonatas al ni kaj estos bezonataj al estontaj generacioj. Tradukitaj al Esperanto, ili ankoraŭ alproksimiĝis al tutmonda legantaro.

Interalie, interesa paralelo okazas inter Ĉeĥov kaj Zamenhof. Ambaŭ estis kuracistoj¹, kaj ambaŭ ĝis la morto daŭrigis sian kuracistan praktikon, kaj kuracis malriĉulojn plejofte senpage. Ambaŭ donis precipan atenton al homaj suferoj, doloroj, *internekompreniĝo*, kaj strebis reale helpi, kaj kiel doktoroj, kaj en sia krea agado.

Oni devas diri pri la lingvaĵo de la traduko. La lingvaĵo de Ĉeĥov ĉiam estas tre simpla, parolflua kaj absolute trafa. Same mi povas diri pri la traduko: simpla, sed riĉa vortelektio, nenie pretendemaj stilumaĵoj, kiujn tiel ne ŝatis Ĉeĥov. La alta kulturo de vorto.

Kaj ankoraŭ unu trajto, unike miriga por Esperantaj eldonaĵoj: en la libro tute forestas preseraroj! Verŝajne, ni devas danki pro tio redaktoron kaj provlegiston – sed, bedaŭrinde, nek tiu, nek la alia estas nomitaj². En la libro mankas ajnaj eldon-datenoj, krom la jaro kaj la loko. Laŭ mi, tio estas sola ĝia manko.

Tatjana Auderskaja (Ukrainio)

¹ Ili studis samtempe en la medicina fakultato de Moskva Universitato (*La red.*)

² La libron "Onklo Vanja" redaktis kaj provlegis (same kiel ĉiujn numerojn de REGo) V.Aroloviĉ kaj G.Kokolija (*La red.*)

PUŜKIN-TAGO EN ULJANOVSK

Malgraŭ frostego (-29°C) komence de februaro membroj de la urba E-klubo kunvenis en la Palaco de Libroj, la ĉefbiblioteko de Uljanovsk, por omaĝi la memoron de la granda rusa poeto Aleksandro Puŝkin. Ili rakontis pri la vivo kaj kreado de la fama poeto. Interesaj taskoj estis preparitaj por pritemaj konkursoj. La partoprenantoj devis solvi kelkajn literaturajn enigmojn, ekzemple: la teamuloj ricevis fragmentojn de “La neĝa blovado” (tradukita de A.Grabowski) kaj devis enmeti forlasitajn verbojn, donitajn aparte en alfabeto ordo. La dua tasko estis diveni, kiuj titoloj konvenas al kelkaj versaĵoj de Puŝkin. La du teamoj faris ĉion brile.



Poste oni montris kaj komentis lumbildojn pri memorindaj Puŝkin-lokoj: Moskvo, kie li naskiĝis; Carskoje Selo, kie la juna Aleksandro vizitis la liceon – la lernejon por infanoj de elita nobelaro; Kiŝinevo, Odeso kaj Miĥajlovskoje, kien la poeto estis ekzilita pro politikaj versaĵoj; Trigorskoje, kie loĝis liaj bonaj geamikoj kaj kie aperis la fama versaĵo, dediĉita al Anna Kern, “Memoras mi mirindan horon”; la lasta loĝejo de Puŝkin en Peterburgo kaj la Svjatogorskij-monaĥejo kun la tombo de poeto. Ĉiuj deklamis Esperante kaj ruse versaĵetojn de A.Puŝkin. Dum la vespero sonis romancoj kun la tekstoj de la poeto en plenumo de Irina Arĥipova, Ivan Kozlovskij kaj Jelena Obrascova.

Du ekspoziciojn preparis oficistoj de la biblioteko: “Puŝkin en E-literaturo” (O.Kostjunina, estrino de la fremdlingva fakoj) kaj “Puŝkin en muziko kaj pentraĵoj” (L.Lobina, estrino de la arta fakoj).

La frostego ne malhelpis, neniu volis foriri. Kantis Irina Grebeŝcenko kaj Jevgenija Anisimova, poste ĉiuj kune. La kunveno finiĝis per komuna fotado kaj tetrinkado.

Margarita Karceva
(Uljanovsk)



PARTOPRENU LA ENKETON/KONKURSON PRI LITERATURO

La retbutiko de FEL (Flandra Esperanto-Ligo) ekzistas 10 jarojn! Por tion festi, ni organizas grandan literaturan enketon! Ĉiuj esperantistoj en la mondo estas invitataj partopreni la enketon, organizitan de la retbutiko de FEL. Per la enketo ni volas kompili liston de la plej popularaj libroj en Esperantujo nuntempe. Krozu antaŭ la 31-a de marto 2006 al <<http://www.retbutiko.net>> kaj plenigu la enketilon pri viaj plej ŝatataj libroj. La premion ricevos tiuj tri partoprenantoj, kiuj plej akurate respondos jenan konkurso-demandon: “Kio estas la sumo (en eŭroj) de la prezoj de ĉiuj varoj en stoko en la retbutiko je la 9-a de februaro 2006, se de ĉiuj eroj nur unu ekzemplero estas kalkulita?” La tri gajnintoj de la konkurso rajtos aĉeti en la retbutiko FEL-eldonaĵojn por la valoro de respektive 100, 50 kaj 25 eŭroj! Ĉiu esperantisto rajtas sendi nur unu enketilon. La rezulto de la granda enketo aperos en la junia numero de “Monato” kaj en la retpaĝoj de la retbutiko.

(individuaj-membroj)

MIKAELO BRONŜTEJN EN NURENBERGO

La ĉefa, longe antaŭe planita, koncerto okazis vendrede, la 13-an de januaro 2006. Venis 35 personoj – tre diversa publiko. Ĉeestis esperantistoj el Nurenbergo kaj apudaj Erlangen kaj Forchheim; ŝatantoj de bardaj kantoj (eks-sovetianoj) – en Nurenbergo agadas eĉ klubo de bardaj kantoj “Sunfloro”; kaj kelkaj germanoj-neesperantistoj – interalie dungitoj de la lingvulernejo AFI, kiu senpage provizis la koncertejon. Malfacila tasko por Mikaelo, kiun li tamen bone solvis, saltante de la rusa al Esperanto kaj reen. La aŭskultantoj aŭdis kantojn en Esperanto, tradukojn de Mikaelo el la rusa kaj povis kompari ilin kun la originalo, kaj ankaŭ eksciis multajn interesaĵojn pri Esperanto kaj historio de E-movado en Rusio. En kelkaj kantoj al Mikaelo helpis Olga Litvinova – juna kantistino el la nurenberga triopo “Aspiro”, kiu kantas en la internacia lingvo ekde 2005. Spite tre malmultan tempon, disponeblan por provludoj – ne pli ol 2 horoj antaŭ la koncerto – Mikaelo kaj Olga rapide trovis komunan lingvon kaj povis ĝuigi la publikon.



Sabate, la 14-an de januaro, Mikaelo estis invitita al kunveno de la junulara rusa teatro en Nurenbergo. Mikaelo konstruis sian prelegon tiel, ke li nur flanke menciis Esperanton – li rakontis pri poezio, pri si mem, voĉlegis siajn (ruslingvajn) versaĵojn, iomete kantis. Tamen preskaŭ ĉiuj demandoj de la publiko estis priesperantaj. Tiel okazis neatendita informverspero pri Esperanto por 20 personoj.



Dimanĉe, la 15-an de januaro okazis du renkontoj en malpli vasta rondo: la unua kun la lokaj esperantistoj en la restoracio “Alex”, kiun vizitis deko da esperantistoj, kaj la dua – kun la triopo “Aspiro”. Gravan parton de ĝia repertuaro konsistigas kantoj de Mikaelo Bronŝtejn. Tial la okazo renkontiĝi kun la aŭtoro mem, montri al li siajn eksperimentojn kaj aŭskulti kritikon estis gravega kaj unika. Dum la longa vespero estis kaj disputoj, kaj komuna muzikumado, kaj teumado. Rememoriĝis multaj bonegaj kantoj – kaj en Esperanto, kaj en la rusa. Antaŭ la forveturo al Berlino Mikaelo donacis al la “Aspir’-antoj” sian talismanon – lignan urson kun gitaro, – pri kio ili fieras.

Nurenbergaj esperantistoj (kaj ne nur) elkore dankas Mikaelon Bronŝtejn kaj invitas

lin viziti Nurenbergon denove!

Grigory Grin (Germanio)

Fotoj: <<http://public.fotki.com/vorota/aspiro/2006/bronstejn/>>

Triopo “Aspiro”: <<http://aspiro.vorota.de>>

Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin)

Januaro en Germanio

*... Tiel paŝas gaja Didel
Jen laŭ kverka Turingio,
Jen laŭ pina Saksa lando,
Jen laŭ Vestfali’ sambuka,
Laŭ lupola Bavaruj’.
Do ĉu decas plori, Marta,
Se en kampoj vagas Didel,
Se por birdoj fajfas Didel
Kun hazarda ĝojridet’?*

E.Bagrickij

Februaro. Tridek du gradoj transfenestre. Minus tridek du. La rusiaj frostegoj tamen decidis ankaŭ min iom “kareseti”, kaj hodiaŭ tage la orelopintoj efektive suferis pro manko de vintra felĉapo. Ho, mi ja esperis eviti plej ardajn frostojn, pretervivi ilin en pli varma foro – ve, ne okazis! Kion fari, kiel varmigi sin? – Nur plonĝinte en la rememorojn, en la tagojn de la germania turneo. Tute antaŭnelonge ĝi estis finita, do la rememoroj freŝas kaj varmas.

Jam kutimaj por mi estas vintraj turneoj, kiujn mi, ĝis nun havanta konstantan



Novjara nokto en IF

oficon, faras je konto de mia feritempo. Ankaŭ ĉi-jare mi uzis monatan feritempon kaj amikan inviton de kelkaj lokaj Esperanto-grupoj por turneo en Germanio (plus Antverpeno, Belgio). Ĉe komparo kun la antaŭaj rondvojaĝoj tuj okulfrape montriĝas vera ferieco de tiu lasta. Imagu – po du, eĉ po tri tagoj en ĉiu urbo – neniam antaŭe okazis al mi tiaspeca luksaĵo!

Por ne ripeti aron da laŭmerite laŭdaj vortoj, jam diritaj pri la Internacia Festivalo (IF – jam la 22-a!) en Trier, mi diru nur tri frazojn prie. Unue, do, ke ĝuste en IF mi trovis multajn bonajn geamikojn kaj multajn programerojn, speciale interesajn por mi. Due, ke ankaŭ la eta grupo de tiĥvinanoj – Vera Vlasova, gvidanto de la ensemblo “Espero”, Saša Kurma, knabino spertega pri ĵudo-lukto, kaj mi – ne malaktivis dum la IF. Do estis varme akceptitaj kaj la kantoj de Vera, kaj miaj prelegoj, kaj demonstraj porinfanaj ĵudo-bataloj de Saša.

Kaj nun – ek al la vojo!

Antverpeno, 04-06 de januaro

Malnova kanto de Claude Piron enstampis la vortojn “pluva Antverpeno” en mian memoron. Evidente mi estas pli bonŝanca ol li. Sunplena, admirende, feste bela urbo akceptas min tute bonvole en preĝejoj kaj kasteloj, butikoj kaj kafejetoj. Certe, Rubens – la sankonfirme grasetaj korpoj de liaj belulinoj tentas ankaŭ miajn okulojn. Certe, la forhakita mano de la kolera giganto. Iam tiu giganto baradis la ŝipeniron en la havenon per sia mano, do ĝi estis forhakita (legenda glorago de iu heroo junulo) kaj ĵetita en la maron. Nun la ŝtona manego estas kuŝanta en unu el la centraj placoj; kaj manetoj ĉokoladaj – nigraj kaj blankaj – estas suveniĝo, ŝatata de turistoj.

Du memorindaj rememorplenaj vesperoj okazis en Antverpeno. Dum la unua mi ravite aŭskultis. Ĉe ioma konsumado de rusa vodko sonis la rememoroj de TEJO-veteranoj, la organizintoj de la unuaj IS-oj. Mi vidis la rolulojn junaj kaj belaj en la fotoj kelkdekjaraĝaj, mi enviis ilian vivon, trovante aron da interesaj, memorfiksindaj detaloj. Dum la dua estis mi, kiu rakontis al ĉirkaŭ kvardek anoj de Antverpena klubo “Verda Stelo” pri SEJM 40-jara. Mi rimarkis kun plezuro, ke ankaŭ nialandaj eventoj iamaj tuŝas animojn de la ĉeestantoj. Dum la sama vespero mi konatiĝis kun Cristian Declerk, la aŭtoro de la renoma romano “Tarokoj kaj epokoj”. Normala homo, interesa kunparolanto.

Krefeld-Duisburg, 07-08 de januaro

Fru-frumatene ni startas reen, Germanien, por ĝustatempe enaviigi kanadan esperantiston Yves – post IF kaj antverpenumado li forflugas hejmen al Otavo. Sed



en la familio Ebel

ni (mi kaj la ĵip-mastrino Yte) tuj akcelas la aŭton al Krefeld, kie post horeto okazas animŝira, kortuŝa brakumado. Ĉar loĝas en tiu urbeto bonaj amikoj, iamaj aktivuloj de SEJM Roza kaj Valdemar Ebel. Do jes, nun la duontaga programo – rememoroj, fotoj antaŭkvardejaraj, konvenaj temoj por babili, kanti ktp. Poste, jam ĉiuj kune – al najbara urbo Duisburg. Tie, en iama bunkro – nuna komforta loĝejo de la familio Sozuer – amasiĝas por diboĉeti jam granda kaj absolute ĉarma kom-

panio: la gemastroj, du iliaj denaskulinoj – la kvinjara Melani’ kaj la sepjara Alina, nia kvinopo, veninta el Krefeld, kaj laste – preskaŭ perdiĝintaj dagestananoj, Elmira kaj Aĥman. Tiuj venis post sukcesaj koncertoj en Francio.

Aparte pri la knabinetoj, ĉar amindaj. Antaŭ du jaroj la fabelo, verkita de Alina (tiam kvinjara!), gajnis la unuan lokon en la internacia konkurso de infanaj (ne porinfanaj, sed ĝuste – infanaj) fabeloj. Tio jam estas io, ĉu ne? Melani’ dume ne atingis tioman gloron, sed samkiel la franjo ludemas kaj kantemas, do ni triope eĉ sukcesas pretigi la kanton de krokodilo Geĉjo por la morgaŭa koncerto.

Morgaŭ la koncerta salono (tre impona akustike kaj teknike!) kunvenigas dank’ al antaŭa reklamo ĉirkaŭ kvindek spektantojn. Ne nur esperantistojn, do nia mastro Lars interpretas. Dum iom pli ol du horoj ni kun evidenta sukceso distras la publikon. Aĥman rakontas pri Dagestano, Elmira kantas bele (ja – profesia kantistino!), ankaŭ mi kun la etulinoj akaparas aplaŭdegon. Aĥ, jen bedaŭrinda miso – mi forgesis anonci, ke pri la fama krokodilo ni kantas por Volodja Ebel, kiu festas la 55-jaran naskiĝtagon! Tamen, Volodja, – gratulojn kaj kisojn por vi!

Mi nenion diris pri Duisburg. Do – industria urbo.

Munkeno, 09-12 de januaro

La 9-a estas perdita tago. Ĉar de la mateno ĝis la vespero la triopo (Elmira, Aĥman kaj mi) entrainas, kvarfoje ŝanĝante trajnojn, eĉ unufoje mistrafas! Tamen – transfenestre daŭras pitoreskaj bordoj de Rejno, vitkovritaj montetoj, pompaj kasteloj, do ni ne enuas. Ĉirkaŭ la noktomezo ni finfine atingas komfortan domon de nia gastiganto Karl, bongustegan bavaran bieron kaj varmajn molajn litojn. Bonan nokton!

Matene – en la urbegon, ĉar vokas sunpleno kaj frosteto. Arego da munkenanoj, farniente promenanta en tiuj stratoj kaj placoj antikve pitoreskaj, varmigas sin per “gluhwein” – varmigita ruĝa vino kun cinamo. Karl invitas nin varmiĝi en “Hofbrauhaus” – la fama giganta bierejo. Ĉi tie antaŭ ok jardekoj Hitler umadis ĝis la stato de “bierpuĉo”. Ĉi tie sur specialaj bretoj staras personaj litraj kruĉoj por fide-

laj klientoj. Ĉi tie tuttage sonas viva gaja bavara muziko far orkestreto tre impona (tri blovmuzikiloj plus akordeono), kaj knabinjo, dekoltita super trankvileco de Aĥman, promenas inter la tablovicoj, proponante kringojn. Ĉi tie nun sidas ĉebiere-ĉemanĝe la reprezentantoj de laka popolo kun certa ulo el Tihvin. Areto da rusaj turistoj, enirinta la bierejigon nur por foti, haltas ĝuste apud nia tablo kaj avide observas nin. Vespere – renkontiĝo kun eta grupo de esperantistoj pli-malpli junaj. Mi diru – provkantado.

Same suna estas la sekvanta mateno. Karl veturigas nin al Alpoj. Eluzita karbominejo Peisenberg, kie nun estas muzeo – speciale por mi, iama ministro. Sed ankaŭ Elmira kun Aĥman ricevas kaskojn kaj aktive filmas. Ekde la mineja mallumo – ĝis la montopinto kun belega alpa vidindaĵo, kaj poste – en la intermonta fabela vilaĝo Oberammergau, kie pentraĵoj ornamas la murojn de ĉiu domo. Lastaj sunradioj adiaŭas nin de trans neĝkovritaj rokoj, kaj ĉapeloj, prove surkapigitaj, aspektigas nin preskaŭ bavare. Bona tago!

La 12-a estas koncerta tago. Denove ĉirkaŭ kvindekpersona publiko, sed pli komplika, ĉar trispeca. Pli ol deko da esperantistoj plus eksteresperantaj bavaroj plus rusoj, kiuj ne komprenas Esperanton, nek bone la germanan. Ni kantas por kontentigi ĉiujn – do Esperante, ruse, lake, kumuke, ukraine, eĉ kartvele, pole kaj jide. La publiko kontentas kaj malavaras pri aplaŭdoj.

Post la koncerto en la stacidoma restoracio okazas adiaŭa bierumado. Ekde ĉi tie la laka popolo iros sian vojon, sed mi – la mian.

Nurenbergo, 13-15 de januaro

Hasta tago. Pertrajna alveno posttagmeze al la eksjekaterinburga juna familio Grin – tre simpatia. Duŝo, manĝo. Nelonga provkantado kun Olga – solistino de la grupo “Aspiro” kaj – al la koncerto. Malgraŭ miaj timetoj ĉio pasas bone ĉe 40-persona publiko. La koncertej-mastro ofertas ĉampanon. Mi konatiĝas kun la tria “Aspiro”-ano, Sergej Orlovskij.

Sekvamatene – kun Nataŝa kaj Grigory Grin, ankaŭ kun ilia dumonata Viktor – en la muzeon de nazipartiaj kongresoj. Efektive, ĉiuj diktatoroj manias pri gigantaj objektoj. Hitler ne estis escepto. Do – kolosa betonita placego por paradoj de militveturiloj, ne malpli kolosa kolizeforma kunvenejo k.s. – ĉio restis mirakle netuŝita de la bomboj en 1945. En unu alo de la “Kolizeo” situas la muzeo, eble la plej morna post “Jad-Vaŝem”, sed certe vizitenda. Ĉar enestas tie la tuto de la nazia historio ekde 1933 ĝis la fino de la mondfama Nurenberga proceso.

Vespere min atendas surprize sukcesa kaj interesega unuavice por mi renkontiĝo kun la Nurenberga rusa junulara teatro. La temo iĝas klara nur horon antaŭ la kunveno: “Integriĝi en fremda socio”. Do – kelkafejeto, pli ol dudek geaktoroj en la aĝo de 20 ĝis 30, ilia gvidanto miaaĝa, kaj mi, kiu devas “varmigi” ilin antaŭ la ĉeftema diskutado. Kaptinte la temon, mi devas momente refari la planitan programon – mi recitas miajn ruslingvajn poemojn, kantas ruslingvajn kantojn sed ĉe prezentado de Puŝkin- kaj Brodskij-tradukoj iom aludas pri Esperanto. Akurate post 40 minutoj, oferitaj al mi, la prezentado estas finita. Sed sekvas demandoj, unu horo da demandoj, plejparte pri Esperanto kaj apoteoze – petoj pri lern-ebleco

– tio do restu por Grigory Grin. Kaj jam post tio ekas la ĉeftemo – ĝis la noktomezo mi aŭdas animtuŝajn historiojn pri la junularaj spertoj elvivi en la fremda socio.

La tria tago. Promenado en la antikva urbo. Tagmanĝo kun deko da esperantistoj – fakte, spertointerŝanĝo pri instruado kaj pri vigligo de la klubo vivo. Kaj fintage – kelkhora admirinda kantadkonatiĝo kun “Aspiro”. Grigory – manaĝero, organizanto. Olga – belega kaj instruita voĉo. Sergej – bardo kaj animiganto. Li meritus apartan longan rakonton, almenaŭ pro la fanatika adoro de barda kanto kiel ĝenro kaj pro la verkita libro “Historio de bardoj en la mondo ekde Orfeo ĝis la fino de la 20-a jc.”. Tamen – estus tro longa la rakonto...

Berlino, 16-17 de januaro

Mi ne kapablas dormi side. Do la nokta trajnvojaĝo de Nurenbergo al Berlino estis laciga. Tamen je la kvina matene la kompatinda Peter, mia gastiganto, renkontas min ĉe la kajo de “Berliner Zoo”. Do mi almenaŭ povas iom dormeti, sed li devas eklabori dematene. Mi kompatas.

Vespere – koncerto por berlina esperantistaro. Trideko da venintoj estas la kvanto mirinda eĉ por la organizantoj. Por mi ili estas la plej komforta publiko, ĉar mankas neparolantoj kaj komencantoj. Eblas paroli ne simpligante la lingvaĵon. Eĉ ges-roj Blanke venis – jen ili sidas en la dua vico. De alia flanko tia publiko kapablas fari sufiĉe malkomfortajn demandojn, kaj efektive mi ricevas tiujn, ekz.: “Kial esperantistaj organizaĵoj en Rusio ĉiam malamikas inter si – ekde Postnikov-tempo ĝis nun?” aŭ “Kial en REU oficiale membras 200 personoj, sed “La Ondo” havas 500 abonantojn?”, aŭ “Ĉu ekzistas en la nuna Rusio E-organizo, komparebla kun SEJM?”, ktp. Mi ŝatus havi apude almenaŭ REU-prezidanton kiel respondulon, sed mi staras sola tie ĉi, do devas iel elturniĝi. Jam dum la postkoncerta bierumo Detlev Blanke diras: “Bone, ke vi ne nuligas la rolon de Isajev. Ja li laboris, agis...”

La sekvanta tago – promena. Kun ĉarma juna krimeanino Irina mi promenas en la suna Berlino – de la fama televidturo ĝis la travidebla kupolo de la rekonstruita “Reichstag”, kie spektindas panoramo de la tuta urbo. De la strangaspekta monumento por la viktimoj de Holokaŭsto ĝis la fama “Check Point Charlie”, kie en 1961 kontraŭstaris sovetiaj kaj usonaj tankoj, atendante ekon de nova mondmilito. Ne okazis, feliĉe...

Vespere Peter, entuziasmiĝinta pro mia hieraŭa “Kanto de leganto”, proponas esplori lian “bibliotekon”. Ni komencas la legadon de ekzotika tekilo-libro kaj finas per iom pli riĉenhava irlanda “Jameson”. Peter estas denaska esperantisto, partopreninta sian unuan IIK-on en 1951. Do ni havas multon por pribabili dum legado ĝispostmeznokta.

Dresdeno, 18-20 de januaro

La ĉefstacidomon de Dresdeno, grave detruitan de la antaŭkvarjara inundo, mi atingas je la kvara posttagmeze. Do la tempo permesas nur rigardeti la urbon el la fenestro de la aŭto dum mia gastiganto Benito veturigas min al sia hejmo.

Ekde la sekvanta mateno mi laboras en la gimnazio Bertold Brecht, kie Benito estas instruisto franclingva. Mi havas du horojn en diversaĝaj klasoj de Benito plus koncerton por gimnazianoj tuj post la dekdia. Ĉio ĉi ĝuindas kaj pasas glate. La in-

fanoj en ambaŭ klasoj atente aŭskultas, multe kaj sincere demandas. Por la koncerto mi ricevas plenplenan aŭlon (eble pli ol cent kvindek geknaboj) kaj eksrusian knabineton kiel interpretiston. Ĉar ĉiuj ĉeestantoj estas eksrusianoj aŭ elektis lerni la rusan, mi parolas ruslingve, sed la interpretisto ne malutilas, certe. Mi penas regi la aŭditorion, sed, honestadire, rimarkas, ke ne ĉiuj infanoj atentigas min. Nur poste tri instruistinoj de la rusa venas al mi kun dankoj kaj pardonpetoj, klarigante, ke la infanoj venis la aŭlon sen tagmanĝi. Kompatindaj infanoj!

Ekskurseto en la urbo tamen okazas posttagmeze. Ankaŭ agrabla vespermanĝo en nevasta esperantista rondo. Kio restas por morgaŭ? – Nur aĉetado de provizaĵoj por la longa revena vojo.

Landlimo inter Pollando kaj Belorusio, 21 de januaro

Bonas la signo – foriri dum pluvo. La pluveto, akompaninta min dum la enbusiĝo en Dresdeno, dumvoje fariĝas pluvego, sed poste – neĝego. Oftaj vojakcidentoj, kaŭzitaj de tiu naturkataklismo, reduktas la rapidon de nia buso ĝis dek km/hore. Do mi havas la tempon sufiĉan por pripensi la ĵus finitan turneon.

Unue – la homoj. Mi parolis pri diversaj aferoj, iel-tiel ligante ĉion kun Esperanto, sume al pli ol 350 personoj, inter kiuj nur kvarono estas esperantistoj. El-inter la lastaj mi trovis bonajn amikojn – iamajn kaj novajn, afablajn kaj zorgemajn gastigantojn, lertajn kaj interesajn ĉiĉeronojn. Nepre mi devas diri plej koran dankon al Hans-Dieter (HDP), kiu estis inspiranto kaj ĉeforganizanto de mia turneo, al Kristin, al Gunnar, al la familioj Humet, Ebel, Sozuer, Breuninger, Grin, Kuehnel, al Olga, Sergej, Johano, Irina, Benito, Umberto, ankaŭ al miaj kunkoncertintoj – Elmira Kurbanova kaj Abdurahman Junusov.

Due – la impresoj. Abundas tiuj en mia vojaĝa taglibro – ja mi estas vizitinta ĉirkaŭ dekon da lokoj novaj por mi. La plej impresaj eventoj jen kaj jen estas malnete versigitaj. Eble mi garnu per unu-du poemetoj la raporton por REGo. Pliajn poemetojn (kiam finpoluritos) ricevu ĉe deziro la ŝatata de mi redaktoro de SkK (“Scienco kaj kulturo”). La cetero eventuale taŭgos por ontaj rememoroj de la emeritulo.

... Mi elreviĝas. La buso haltas ĉe la pola doganejo. La ŝoforo anoncas per la busa radio: “Gesinjoroj! Ne preterlasu la lastan okazon uzi komfortan kaj senpagan necesejon. Poste ni eniros la teritorion de nia patrujo.” Bona konsilo – la pasaĝeroj iom tumulte forlasas la buson.

31.12.05. Novjaro en IF

Silentiĝas brueg’ en la gaja salon’,

Kaptas lastajn sekundojn krepusko enkorpe.

Haltis sled’ de l’ Novjaro ĉe l’ festa peron’,

Ĉar la tempo plu daŭras – senĉese, senmorte.

Gvato preskaŭ sopira, enpenso forkur’ –

Adiaŭo kun jar’, forfluanta el vivoj.

Spirohalta streĉiĝo, eksvinga susur’ –

Jen abrupta impulso de l’ sentoj naivaj.

Ektintante pokalon salutas pokal’,

Infanecan ekĝojon estingas nenio,
Kvazaŭ post la dekdua horloĝa signal’
Ĉies viv’ komenciĝas de l’ pura folio.

Alina kaj Melani’, 09.01.2006

Iel-tiel amikiĝis ja ni, –
Mi, Alina kaj Melani’, –
Oldulet’ – grizbarba densec’
Kun infanoj – ok jaroj kaj ses.
Do ekludas brue, gaje sen lac’
Ni sur la tapiŝa etspac’,
Ĝis alveno de laciĝo por leg’
De l’ fabeloj – laŭ ilia elekt’.

Kaj Alina, la pli aĝa knabin’,
Ruze ekrigardas nun min,
Milde petas kune kun Melani’:
– Montru, oĝjo, piraton por ni!
Via barbo vere taŭgas en tut’,
Nur okulon vian ŝirmu per tuk’!
Sed mansvingas nee mi por protest’
Kaj gitaron prenas el kest’.

Tute mi ne ŝatus esti rabist’,
Nek pirat’ el morna fabel’ –
Malgraŭ la horora aĝa abism’
Infankantojn tiras mi el
Apudnuka mia cerboprovinc’, –
Ja l’ knabinoj venis kun pet’, –
Kantas mi pri abieto, pri vintr’
Kiel kantas por mia nepet’.

Okuletoj brilas – jen la plezur’!
Devas iom do instrui mi nur, –
Kaj trio pe kun impet’ kantas ni, –
Mi, Alina kaj Melani’.



kun Alina kaj Melani’

Ĉu vi kuiras ĉine?

Isac Cohen manĝis en ĉina restoracio (same kiel ĉiu “bona” judo en Usono...) kaj babiletis kun la kelnero Wong Chong.
Cohen: “Vi, ĉinoj, estas konsiderataj kiel tre saĝa popolo.”
Wong: “Tio veras. Ĝi estas pro tio, ke nia kulturo estas tre antikva: ĝi aĝas 4000 jarojn. Sed ankaŭ vi, judoj, estas tre saĝaj. Ĉu mi pravas?”
Cohen: “Jes, ni estas saĝaj. Nia kulturo aĝas 4500 jarojn.”
Wong: “Tio tute ne eblas! Kie do vi manĝis dum 500 jaroj?”

(juda anekdoto de Josef Shemer)

Viktor Ĉaldajev (Barnaul)

FANTOMPERONOJ

Fantomperonoj...

vi longe en pasint' ... –
kiel insuloj de l' junec',
kaŝantaj sin
en ŝajnebulaj dens'...
En sonĝoj nunaj nur mia kur' al vi,
fantom...peronoj...

SPEKTRARKO!..

Rav'
el ruĝ', oranĝo, flavo,
verd', lazuro, blu', viol'!..
Ĉielarko – Vi – Spektrarko,
savas korojn el Izol'!..

LA BONECO!..

Al mi bona av', kun barb',
en la sonĝo venis,
kun karesa kora varm', –
lin mi ne divenis...
Poste venis la diven':
li 'stis Ludoviko!..
ĉi ja iĝis la subten'
de la bonamiko!

ETERAJ PONTOJ...

Eteraj pontoj!..
Eteraj pontoj!..
iuj transmaraj...
iuj transmontoj...
jen-jen – ĉe-Teraj!..
al-Jupiteraj!..
en spac', liberaj,
vi ligas mondojn.
Eteraj pontoj!..
Eteraj pontoj!..
frekvencaj-ondaj!..
el vibraj fontoj...
interkruciĝaj...
interrenkontaj...
interpenetre
disirontaj...

Eteraj pontoj!..
logaj pontoj!..
nin ligaj aŭde...
ligaj montre...

LA VETER'... KAJ LA ETER'...

Hejmo de Jaskov.
En ĉambro li, mi, Sveta.
Aparataro sur bretoj.
Kontaktoj la eteraj...
malbonveteraj...
En orelingoj – bru'... bru'...
ĉar ie fulmoj...
la esperanta parolo,
pro l' bolo, –
aĉe simbola... –
por mi...
ne tiom por li...
Hodiaŭ ne tre...
tamen ni sidas...
Malfrua jam hor'...
Sveta, mi – for...
Trafik' ne funkcias –
ni ne veturas.
Urb'... Nokt'... Pluv'... –
... ni kuras!..

LA SONOJ...

Esperanto, mi ŝatas vin
kiel revon!..
kiel revon de via aŭtor'!..
De l' sufiksoj sonor'!..
de l' prefiksoj sonor'!..
ja son...ar', ja son...er',
re...sonor'...
Ĝi 'stas kvazaŭ iaj kreaĵ...
sentosencojn...
la onomatopeajn!..
* * *

Se vi amas –
do disiĝu –
rememoros
dum tutviv'.